# Gerda Malaperis

## Claude Piron



Teksto neprintebla, surbaze de la reta eldono de la
***Gerda-kurso en la Reto***
(*http://www.esperanto.org/gerda*)
kunordigita de Edmund GRIMLEY EVANS

*Pdf-dosiero ellaborita de Adonis Saliba (Nov 2002)*
*http://www.monda.org/nesto*

*Sonoj ellaboritaj de Emilio Cid kaj Simone Cid ĉe*
*http://www.esperantointernacia.hpg.ig.com.br/gerda.htm*

# ENHAVO


ENHAVO ... 2
ĈAPITRO 1 (UNU) ... 4
DEMANDOJ (1) ... 5
EKZERCOJ (1) ... 5
ĈAPITRO 2 (DU) ... 6
DEMANDOJ (2) ... 7
EKZERCOJ (2) ... 7
ĈAPITRO 3 (TRI) ... 8
DEMANDOJ (3) ... 10
EKZERCOJ (3) ... 10
ĈAPITRO 4 (KVAR) ... 11
DEMANDOJ (4) ... 12
EKZERCOJ (4) ... 12
ĈAPITRO 5 (KVIN) ... 14
DEMANDOJ (5) ... 15
EKZERCOJ (5) ... 15
ĈAPITRO 6 (SES) ... 16
DEMANDOJ (6) ... 17
EKZERCOJ (6) ... 17
ĈAPITRO 7 (SEP) ... 18
DEMANDOJ (7) ... 19
EKZERCOJ (7) ... 19
ĈAPITRO 8 (OK) ... 21
DEMANDOJ (8) ... 23
EKZERCOJ (8) ... 23
ĈAPITRO 9 (NAŬ) ... 25
DEMANDOJ (9) ... 26
EKZERCO (9) ... 26
ĈAPITRO 10 (DEK) ... 28
DEMANDOJ (10) ... 29
EKZERCOJ (10) ... 29
ĈAPITRO 11 (DEK UNU) ... 31
DEMANDOJ (11) ... 33
EKZERCOJ (11) ... 33
ĈAPITRO 12 (DEK DU) ... 34
DEMANDOJ (12) ... 36
EKZERCOJ (12) ... 36
ĈAPITRO 13 (DEK TRI) ... 37
DEMANDOJ (13) ... 39
EKZERCOJ (13) ... 39
ĈAPITRO 14 (DEK KVAR) ... 41
DEMANDOJ (14) ... 43
EKZERCOJ (14) ... 43
ĈAPITRO 15 (DEK KVIN) ... 45
DEMANDOJ (15) ... 47

EKZERCOJ (15) ........ 47
ĈAPITRO 16 (DEK SES) ........ 49
DEMANDOJ (16) ........ 51
NOTOJ ........ 51
EKZERCOJ (16) ........ 52
ĈAPITRO 17 (DEK SEP) ........ 53
DEMANDOJ (17) ........ 55
NOTOJ ........ 55
EKZERCOJ (17) ........ 56
ĈAPITRO 18 (DEK OK) ........ 58
DEMANDOJ (18) ........ 59
NOTOJ ........ 59
EKZERCOJ (18) ........ 60
ĈAPITRO 19 (DEK NAŬ) ........ 62
DEMANDOJ (19) ........ 63
EKZERCOJ (19) ........ 63
ĈAPITRO 20 (DUDEK) ........ 65
DEMANDOJ (20) ........ 67
EKZERCOJ (20) ........ 67
ĈAPITRO 21 (DUDEK UNU) ........ 70
DEMANDOJ (21) ........ 72
EKZERCOJ (21) ........ 72
ĈAPITRO 22 (DUDEK DU) ........ 74
DEMANDOJ (22) ........ 76
EKZERCOJ (22) ........ 76
ĈAPITRO 23 (DUDEK TRI) ........ 78
DEMANDOJ (23) ........ 79
NOTOJ ........ 79
EKZERCOJ (23) ........ 80
ĈAPITRO 24 (DUDEK KVAR) ........ 82
DEMANDOJ (24) ........ 84
NOTOJ ........ 84
EKZERCOJ (24) ........ 85
ĈAPITRO 25 (DUDEK KVIN) ........ 87
NOVA MISTERO! ........ 89
DEMANDOJ, SED NE EKZERCOJ ........ 89

# ĈAPITRO 1 (UNU)

*Aŭdu ĉapitron 1 ĉe interreto*
*http://www.monda.org/nesto/biblioteko/sonoj/Gerda01a.mp3*

(En universitata restoracio)
Tom: Saluton, Linda.
Linda: Saluton, Tom.
Tom: Diru al mi: kiu estas tiu?
Linda: Kiu?
Tom: Tiu alta, blonda, juna viro...
Linda: Kiu?
Tom: Tiu, kiu sidas en la angulo.
Linda: Ho, tiu!
Tom: Jes, tiu.
Linda: Mi ne scias. Mi ne scias, kiu li estas. Nova studento, verŝajne.
Tom: Li estas tute sola.
Linda: Ne. Rigardu. Bela knabino iras al li.
Tom: Ne bela. Juna, eble, sed ne bela. Nur vi estas bela, Linda.
Linda: Tom, kara! Kio okazas al vi? Eble vi laboras tro multe, kaj...
Tom: Nenio speciala okazas al mi. Kaj mi ne laboras tro multe. Fakte, mi laboras malmulte nun. La vera demando estas: kio okazas al vi, Linda? Nur vi estas vere bela.
Linda: Nu, nu...
Tom: Estas fakto. Nur vi estas bela, Linda. Mi estas sincera. Venu kun mi!
Linda: Sed...
Tom: Venu. Al la granda spegulo. Rigardu. Jen estas Linda, la plej bela virino en la mondo, la plej bela virino en la tuta mondo.
Linda: Kaj jen estas Tom, la plej malserioza knabo en la tuta universitato.

## *DEMANDOJ (1)*

Diru al mi:
Kiu sidas en la angulo?
(Tom / Linda / blonda viro / juna knabino / maljuna viro)
Kiu iras al li?
(Tom / Linda / blonda viro / juna knabino / maljuna viro)
Al kio iras Tom kaj Linda?
(al la angulo / al granda spegulo / al la nova studento / al la blonda viro)
Kiu estas (eble) la plej bela virino en la mondo?
(Tom / Linda / blonda viro / bela knabino / maljuna viro)
Kiu estas (eble) la plej malserioza knabo en la universitato?
(Tom / Linda / blonda viro / bela knabino / maljuna viro)

## *EKZERCOJ (1)*

*Ekzemplo:*
{ -a al -as grand- ir- mi -o spegul- }
→ Mi iras al granda spegulo.
Jen:
{ -a -as est- grand- li -o vir- }
{ -a -as en est- li -o restoraci- student- }
{ -a jen labor- nov- -o }
{ -a -as nenio nun okaz- special- }
{ -as bel- est- kio -o ? }

# ĈAPITRO 2 (DU)

*Aŭdu ĉapitron 2 ĉe interreto*
*http://www.monda.org/nesto/biblioteko/sonoj/Gerda02a.mp3*

Linda: Tom!

Tom: Kio okazas al vi? Vi estas pala! Bela, sed pala.

Linda: Tom! Ne rigardu!

Tom: Kio okazas?

Linda: Strange! Okazas io stranga, io tre stranga. Tiu ulo, tiu nova studento... Ne, Ne, mi petas vin, ne rigardu. Estu diskreta.

Tom: Diable! Diru al mi. Kio estas tiu mistero?

Linda: Lia mano agas strange. Rigardu, se vi volas, sed plej diskrete. Turnu vin iomete, eble, sed tute nature. Li ne vidu, ke vi rigardas al li.

Tom: Vi pravas. Io stranga okazas. Dum ŝi ne rigardas al li -- ŝi nun rigardas al la granda spegulo -- lia mano iom post iom, tre tre malrapide, proksimiĝas al ŝia taso...

Linda: Estas io en lia mano.

Tom: Mi ne vidas. Li estas tro malproksima. Diable! Tiu alta forta knabo nun staras inter ili kaj mi. Mi ne plu vidas.

Linda: Sed mi vidas. Mi vidas bone. Mi vidas tre bone. Mi vidas tute bone. Ej!

Tom: Kio okazas?

Linda: Ŝi rigardas al li nun, kaj lia mano haltas.

Tom: Kaj kio plu? Diru al mi!

Linda: Nun li parolas al ŝi. Li montras al la pordo.

Tom: Eble li volas, ke ŝi rigardu al alia direkto, ke ŝi ne plu rigardu al li.

Linda: Prave, tute prave. Jen ŝi rigardas al la pordo. Li plu parolas kaj parolas. Dum ŝi ne rigardas al lia direkto, lia mano plu proksimiĝas al la taso. Ej!

Tom: Kio? Kio okazas?

Linda: Lia mano revenas, tute diskrete, kvazaŭ tute nature.

Tom: Ĉu estas io en lia mano?

Linda: Nenio plu. Sed tute certe nun estas io en ŝia taso.

## *DEMANDOJ (2)*

Linda estas ___.
(malserioza / nova studento / bela kaj pala / io stranga)
Kio okazas?
(Linda rigardas al la spegulo. / Malalta viro staras inter Tom kaj la pordo. / La blonda viro agas strange.
/ La nova studento proksimiĝas al Tom.)
Ĉu estas io en lia mano?
(jes / ne)
Al kio montras la mistera ulo?
(al la spegulo / al la pordo / al Linda / al Tom / al la angulo)
Al kio rigardas la juna knabino, kiu estas kun li?
(al la spegulo / al la pordo / al Linda / al Tom / al la angulo)
Ĉu nun estas io en la taso?
(jes / ne)

## *EKZERCOJ (2)*

*Ekzemplo:*
Turnu vin iomete, [ĉu / se] vi volas.
→Turnu vin iomete, se vi volas.
Jen:
Mi ne vidas, [ĉu / se] la junulo parolas al la knabino, aŭ [ĉu / se] li nur rigardas al ŝi.
Vi vidas lin tute bone, [ĉu / se] ne?
[Ĉu / Se] li agas strange, li estas strangulo.
Mi alparolas knabinojn, [ĉu / se] ili rigardas al mi.
Mi ne scias, [ĉu / se] mi alparolu ŝin aŭ ne.
[Ĉu / Se] ŝi parolas al mi, [ĉu / se] mi reparolu al ŝi?
Li estas en universitato, [ĉu / se] li estas studento.
Mi ne certas, [ĉu / se] li estas studento. Li estas tro maljuna.

# ĈAPITRO 3 (TRI)

*Aŭdu ĉapitron 3 ĉe interreto*
*http://www.monda.org/nesto/biblioteko/sonoj/Gerda03a.mp3*

Bob: Diable! Kio okazas? Vi aspektas kiel spionoj. Ĉu mi povas sidi kun vi?
Linda: Saluton, Bob.
Tom: Bonan tagon, Bob.
Bob: Bonan tagon, Linda. Bonan tagon, Tom. Pardonu, ke mi ne salutis vin tuj.
Linda: Ne gravas. Nun vi salutis, kaj ni pardonas vin.
Bob: Ĉu vi permesas, ke mi sidu ĉe via tablo?
Linda: Kompreneble, vi sidu kun ni.
Bob: Mi tamen ne volas esti maldiskreta. Eble Tom parolas pri amo kaj preferas esti sola kun vi.
Tom: Mi ne parolis pri amo.
Linda: Li nur diris, ke mi estas la plej bela virino en la tuta mondo.
Bob: Li pravas. Tio ne estas amdeklaro, tio estas simpla fakto.
Tom: Prave. Simpla fakto.
Bob: Nu, certe, Linda estas tre bela, sed ne tio gravas nun.
Linda: Ne gravas, ĉu? Ne gravas, ke mi estas bela, ĉu? Jen bela deklaro!
Bob: Pardonu min. Mi volas diri, ke io estas pli grava.
Tom: Kio? Pri kio vi parolas? Kio estas pli grava?
Bob: Vi ne vidis min, dum mi proksimiĝis al vi, sed mi vin rigardis.
Linda: Mi ne komprenas, pri kio vi parolas.
Bob: Mi parolas pri via vizaĝo.
Linda: Kio pri mia vizaĝo? Ĉu ĝi ne estas bela?
Bob: Ho jes, ĝi estas bela, ĝi estas la plej bela en la mondo. Sed ĝi estis mistera!
Linda: Mistera? Ĉu mia vizaĝo estis mistera?
Bob: Jes. Via vizaĝo estis mistera. Fakte, viaj vizaĝoj estis misteraj. Mistera vizaĝo de spionino ĉe mistera vizaĝo de spiono. Vi aspektis strange. Vi aspektis mistere. Mi bone rigardis vin, dum mi proksimiĝis al vi, kaj estis mistera esprimo sur via vizaĝo, Linda, kaj ankaŭ sur via, Tom. Kiel mi jam diris, vi aspektis kiel spionoj.

## *DEMANDOJ (3)*

Kiuj aspektas kiel spionoj?
 (Linda kaj Tom / Linda kaj Bob / Bob kaj Tom / Gerda kaj la blondulo)
Ĉu Bob salutas ilin tuj?
 (jes /ne)
Ĉu Linda kaj Tom permesas, ke Bob sidu ĉe ilia tablo?
 (jes / ne)
Kiu ne volas esti maldiskreta?
 (Bob / Tom / Linda / Gerda / la blondulo)
Kio estas sur la vizaĝo de Linda?
 (bela deklaro / bona tago / mistera esprimo / io pli grava)

## *EKZERCOJ (3)*

*Ekzemplo:*
{ -as aspekt- ĉu kiel la -o -o student- ul- ? }
→ Ĉu la ulo aspektas kiel studento?
Jen:
{ -as -bon- mal- ne -o pardon- -ul- }
{ -e -is mi post- re- -ven- }
{ -a- al -as -in- -j -j jun- knab- -o -o- parol- vir- }

# ĈAPITRO 4 (KVAR)

*Aŭdu ĉapitron 4 ĉe interreto*
*http://www.monda.org/nesto/biblioteko/sonoj/Gerda04a.mp3*

Bob: Diru al mi sincere, pri kio vi parolis.
Tom: Ni parolis pri tiu ulo.
Bob: Kiu ulo?
Tom: Tiu viro ĉe la angulo. Tiu juna viro.
Bob: Pri kiu vi parolas? Ĉu pri tiu blondulo, kiu sidas kun Gerda?
Linda: Gerda! Vi do scias, ke ŝia nomo estas Gerda! Vi do konas ŝin!
Bob: Nu, mi ne vere konas ŝin. Mi scias, kiu ŝi estas. Tio estas alia afero.
Linda: Kiu do ŝi estas?
Bob: Sed vi ne respondis al mi. Vi ne respondis al mia demando. Ĉu vere pri tiu blonda junulo vi parolis?
Tom: Jes. Pri li.
Bob: Mi ne konas lin. Mi neniam vidis lin antaŭe.
Linda: Sed, diru al mi, kiu estas tiu Gerda?
Bob: Ŝi venis por instrui. Temas pri io mistera, fakte. Kriptaĵoscienco.
Linda: Kio? Kiel vi diris? Krip-ta-ĵo-sci-en-co, ĉu? Kio estas tio?
Bob: Ĉu vere vi ne scias, kio estas kriptaĵoscienco? Oni diras ankaŭ "kriptografio".
Linda: Ne. Mi ne scias. Mi tute ne scias. Ĉu vi scias, Tom?
Tom: Ĉu tio ne estas la arto kompreni, pri kio temas sekreta mesaĝo?
Bob: Prave. Jen ŝia fako. Fakte, ŝia fako estas la malnovaj sekretaj lingvoj.
Tom: Mi ne komprenas. Kiu, en universitato, volas lerni pri la malnovaj sekretaj lingvoj?
Bob: Ankaŭ mi ne tute komprenas. Estis ideo de Ronga, la profesoro pri lingvistiko. Li konsideras, ke sekretaj lingvoj estas aspekto de la arto komuniki, kaj ke ili do rilatas al lingvistiko.
Linda: Eble jes. Eble li pravas. Kaj tamen tiu ideo estas iom stranga, ĉu vi ne konsentas?
Bob: Jes. Ĝi aspektis strange ankaŭ al mi, kiam oni parolis pri ĝi.
Linda: Eble Ronga, la lingvistika profesoro, nur deziris, ke bela virino kunlaboru kun li. Ĉu ne estas bona ideo kunlabori kun bela knabino, kiam tio estas ebla?

Tom: Mi jam diris al vi, ke ŝi ne estas bela. Nur vi estas bela.

Bob: Mi ne konsentas. Estas fakto, ke Linda estas tre bela, ke ŝi estas la plej bela knabino en la mondo. Sed ankaŭ Gerda estas bela, iom malpli bela, sed tamen bela; ĉu vi konsentas?

Tom: Tute ne. Por vi, eble. Sed por mi ne. Por mi, nur Linda ekzistas kiel bela virino.

Bob: Ĉu vi volas diri, ke por vi Linda estas la sola bela virino en la tuta mondo?

Tom: Jes, por mi, Linda estas la sola bela virino en la tuta mondo.

Bob: Diable! Vi verŝajne amas ŝin.

## *DEMANDOJ (4)*

Respondu:

Pri kio Linda kaj Tom parolis?
 (pri Bob / pri amo / pri la blondulo / pri kriptaĵo-scienco)

Kiu sidas kun la viro, pri kiu Linda kaj Tom parolis?
 (Gerda / Ronga / blonda junulo / Bob / neniu)

Kiu scias, kiu estas Gerda? (Bob / Linda / Tom)

Ĉu Bob konas la blondulon? (jes / ne)

Kion instruas Gerda?
 (novajn lingvojn / lingvistikon / kriptaĵo-sciencon)

Kiu estas profesoro pri lingvistiko?
 (Bob / Linda / Tom / Gerda / Ronga / la blondulo)

Kiu estas la sola bela virino en la tuta mondo, por Tom?
 (Gerda / Linda / Ronga / la knabino en la angulo)

## *EKZERCOJ (4)*

*Ekzemplo:*

[Mi / Min] diris [tio / tion] al [vi / vin].

---> Mi diris tion al vi.

Jen:

[Ili / Ilin] demandas [mi / min].

[Multo / Multon] diras [li / lin] al la studentoj.

Al la studentoj li demandas [tio / tion], [kio / kion] [li / lin] ne scias, sed [ili / ilin] diras [nenio / nenion].

[Ili / Ilin] ne scias.

[Linda / Lindan] ne sidas sole. Venas [bela / belan] [junulo /junulon].

[Tio / Tion] certe estas la [universitato / universitaton].

La [studentoj / studentojn] montras al [mi / min] la [studenta /studentan] [restoracio / restoracion].

[Mi / Min] petas [vi / vin], diru al [mi / min] [tio / tion].

La [blondulo / blondulon], [kiu / kiun] staras en la [restoracio /restoracion], estas [stranga / strangan].

[Ili / Ilin] ne pardonas la [nova / novan] [studento / studenton].

[Li / Lin] ne komprenas. [Tio / Tion] estas [mistera / misteran].

[Li / Lin] preferas [sinceraj / sincerajn] [junuloj / junulojn].

# ĈAPITRO 5 (KVIN)

*Aŭdu ĉapitron 5 ĉe interreto*
[http://www.monda.org/nesto/biblioteko/sonoj/Gerda05a.mp3](http://www.monda.org/nesto/biblioteko/sonoj/Gerda05a.mp3)

Bob: Nu, vi ankoraŭ ne diris al mi, kio okazis, dum vi spione rigardis tiun paron.

Linda: Okazis io vere stranga.

Tom: Vere stranga, fakte. En la mano de tiu junulo estis io.

Bob: Kio?

Linda: Ni ne povis vidi. Io tre eta. Malgranda afero. Afereto.

Tom: Kaj dum ŝi ne rigardis, lia mano alproksimiĝis al ŝia taso.

Linda: Kaj kiam ŝi ekrigardis lin, lia mano ekhaltis.

Tom: Tiam li montris ion al ŝi. Evidente, li deziris forturni ŝian atenton.

Linda: Kaj li sukcesis. Li plene sukcesis. Ŝi rigardis al la pordo. Kaj dum ŝi rigardis for, lia mano subite estis super ŝia taso, dum unu sekundo, ne pli, kaj tute nature revenis. Malplena.

Bob: Ĉu ĝi estis plena antaŭe?

Tom: Ne plena. Kompreneble, ĝi ne estis plena. Sed estis io en ĝi, kaj post kiam ĝi estis dum sekundo super la taso de Gerda, estis plu nenio en ĝi.

Linda: Certe estas iu mistera substanco.

Tom: Iu drogo.

Bob: Kiel vi povas scii, ke ne estis tute simple peco da sukero?

Linda: Li ne agus tiel kaŝe, se estus nur sukero.

Tom: Cetere, ĉi tie ne estas peca sukero. Estas nur pulvora sukero, en sukerujoj.

Bob: Eble li havis sukerpecon en la poŝo kaj...

Tom: Ĉu vi ofte promenas kun sukerpecoj en via poŝo?

Bob: Vi pravas. Tiu ideo estas absurda. Tamen...

Linda: Rigardu! Jen ŝi ekstaras, kaj ekiras for.

Bob: Ŝi ŝajnas tute normala. Verŝajne vi imagis ion draman, dum temas pri tute simpla, tute natura okazaĵo.

## *DEMANDOJ (5)*

Kio estis en la mano de la blondulo antaŭe?
(sukerpeco / la taso de Gerda / io tre malgranda / la taso de Linda / nenio)
Kio estis en lia mano poste?
(sukerpeco / la taso de Gerda / io tre malgranda / la taso de Linda / nenio)
Kio estas en la sukerujoj tie?
(sukerpecoj / pulvora sukero / iu drogo / mistera substanco / sekreta lingvo)
Ĉu estas normale promeni kun sukerpecoj en la poŝo?
(jes / ne)
Kiu ekiras for?
(Linda / Gerda / Tom / Bob / la blondulo)

## *EKZERCOJ (5)*

*Ekzemplo:*
[Kiam / Se] li estus studento, mi lin konus.
→ Se li estus studento, mi lin konus.
Por vi:
Mi ne scias, [kiam / se] ŝi venos al ni.
Mi tre multe laborus, [kiam / se] mi povus.
[Kiam / Se] li estas studento, li estas en la universitato.
[Kiam / Se] Tom estis juna, Gerda jam lernis kriptografion.
Mi volas paroli ankaŭ pri vi, [kiam / se] vi permesas.
Mi parolis kun ŝi, [kiam / se] ŝi sidis en la restoracio.

# ĈAPITRO 6 (SES)

*Aŭdu ĉapitron 6 ĉe interreto*
*[http://www.monda.org/nesto/biblioteko/sonoj/Gerda06a.mp3](http://www.monda.org/nesto/biblioteko/sonoj/Gerda06a.mp3)*

Tom: Ĉu vi aŭdis? Kio estis tio?

Bob: Jes, mi aŭdis. Mi aŭdis ion.

Linda: Ankaŭ mi aŭdis strangan bruon, kvazaŭ iu falus en la koridoro.

Bob: Kvazaŭ _ŝi_ falus.

Tom: Mi havis la saman penson kiel vi. Ankaŭ mi pensis tion. Ankaŭ mi pensis: jen Gerda falas en la koridoro.

Linda: Ĉu ni iru vidi?

Tom: Kompreneble. Ni iru tuj.

Bob: Mi iru kun Tom, sed vi restu ĉi tie, Linda. Observu tiun junulon, kun kiu Gerda parolis, kaj kiu eble metis drogon en ŝian kafon.

Linda: Ĉu vi ambaŭ foriras kaj mi restu tute sola? Mi iom timas.

Bob: Ni ne havas la tempon diskuti. Ni devas iri vidi tuj. Restu trankvile ĉi tie. Vi nenion riskas. Venu, Tom, ni ne perdu tempon.

## *DEMANDOJ (6)*

Kion Tom, Bob kaj Linda aŭdis?
(koridoron / strangan bruon / penson / la blondulon)
Kiu eble falis en la koridoro?
(Tom / Bob / Linda / Gerda / la blondulo / Ronga)
Kiuj iras vidi?
(Linda kaj Tom / Linda kaj Bob / Bob kaj Tom / ĉiuj tri)
Kiu restas por observi?
(Tom / Bob / Linda / la blondulo / Gerda)

## *EKZERCOJ (6)*

*Ekzemplo:*
[Li / Lin] metas [ĝi / ĝin] en la [poŝo / poŝon].
→ Li metas ĝin en la poŝon.
Nun decidu vi:
La [blondulo / blondulon] metis [sukero / sukeron] en la [taso / tason] de [kafo / kafon].
[Li / Lin] volis iri en la [restoracio / restoracion], al la [bela /belan] [knabino / knabinon], sed [li / lin] falas en la [koridoro /koridoron].
Bob konsentas kun [Linda / Lindan].
[Ili / Ilin] rigardas al la [studentoj / studentojn].
[Iu / Iun] perdis [aĵo / aĵon] en la [restoracio / restoracion].
Ili metas [ĝi / ĝin] sur la [tablo / tablon] kaj decidas promeni al la [universitato / universitaton]. [Ili / Ilin] ekiras.

# ĈAPITRO 7 (SEP)

*Aŭdu ĉapitron 7 ĉe interreto*
[http://www.monda.org/nesto/biblioteko/sonoj/Gerda07a.mp3](http://www.monda.org/nesto/biblioteko/sonoj/Gerda07a.mp3)

(En la koridoro)

Tom: Jen ŝi estas. Ni pravis. Ŝi apenaŭ havis la tempon alveni ĝis la angulo, jam ŝi falis. Videble, ŝi estas nekonscia. Ŝi perdis la konscion kaj falis.

Bob: Ĉu ŝi ankoraŭ vivas?

Tom: Jes. Ne timu. Ŝi perdis la konscion, sed ŝi ne perdis la vivon. La koro batas. Ĝi batas malforte, sed tamen batas. Ŝi do vivas. Eble ŝi apenaŭ vivas, sed ŝi vivas.

Bob: Kion ni faru?

Tom: Kion vi opinias?

Bob: Ŝajnas, ke ŝi dormas.

Tom: Ni devas informi la aŭtoritatojn. Tuj. Mi iros. Ili eble decidos voki doktoron, kuraciston, kaj almenaŭ tuj sendos flegistinon. Certe estas flegistino en ĉi tiu universitato, ĉu ne?

Bob: Verŝajne, sed mi ne scias certe. Mi estas ĉi tie apenaŭ unu semajnon.

Tom: Nu, mi tuj iros informi ilin. Restu ĉi tie kun ŝi. Sed ni unue metu ŝin pli bone, ke ŝi kuŝu komforte, kun la piedoj pli altaj ol la kapo.

Bob: Ĉu vere? Ĉu vere vi volas, ke ŝi kuŝu kun la piedoj pli altaj ol la kapo? Tio ne estas komforta.

Tom: Tamen, kiam iu perdis la konscion, tio estas la ĝusta pozicio, se mi bone memoras, kion oni instruis al mi.

## ***DEMANDOJ (7)***

Ĉu Gerda ankoraŭ vivas? (jes / ne)

Kiel batas la koro de Gerda?
(forte / malforte / nekonscie / konscie / verŝajne)
Kiun Tom volas informi?
(la blondulon / la profesoron pri lingvistiko / la aŭtoritatojn /spionon)
Ĉu iu, kiu perdis la konscion, kuŝu kun la kapo pli alta ol la piedoj?
(jes / ne)

## ***EKZERCOJ (7)***

*Ekzemplo:*
[Mi / Min] restis tie unu [semajno / semajnon].
→ Mi restis tie unu semajnon.

Nun faru vi:
La [sukerpeco / sukerpecon] falis en la [kafo / kafon].
Sed [mi / min] ne deziras [sukero / sukeron] en [mia / mian] [kafo / kafon].
Jen [Linda / Lindan] venas en la [restoracio / restoracion]!
Eble [ŝi / ŝin] deziras [kafo / kafon] kun [sukero / sukeron].
[Tiu / Tiun] [tago / tagon] [mi / min] laboris tre multe.
[Li / Lin] restis tie unu [tago / tagon]; [mi / min] restis dum [tuta / tutan] [semajno / semajnon].
Demandu, [kio / kion] [li / lin] faras! --- Ne! Demandu [vi / vin]!
La [kafo / kafon], [kiu / kiun] [vi /vin] havas, estas sen [sukero /sukeron].
La [kafo / kafon], [kiu / kiun] [vi / vin] metis sur la [tablo /tablon], [ili / ilin] ne trinkis.
La [viro / viron], [kiu / kiun] metis [kafo / kafon] sur la [tablo /tablon], ne estas [studento / studenton].
La [tablo / tablon], sur [kiu / kiun] estas la [kafo / kafon], estas tro [malgranda / malgrandan].
Ĉu [vi / vin] havas iom da [kafo / kafon]? --- [Mi / Min] havas tri [tasoj / tasojn] da [kafo / kafon].
*Ekzemplo:*
Ĉu Tom estas same alta [kiel / ol] Bob, aŭ ĉu li estas pli alta [kiel / ol] Bob?

→ Ĉu Tom estas same alta kiel Bob, aŭ ĉu li estas pli alta ol Bob?

Nun faru vi:

[Kiel / Ol] vi scias, Bob estas pli alta [kiel / ol] Tom, sed malpli alta [kiel / ol] la stranga blondulo.

Mi preferus resti ĉi tie [kiel / ol] iri informi la aŭtoritatojn.

La vero ofte ŝajnas pli absurda [kiel / ol] imagaĵoj.

Li iĝis pli kaj pli forta; li iĝis forta [kiel / ol] fortulo.

Iru pli rapide, aŭ iru malpli rapide; iru [kiel / ol] vi volas!

# ĈAPITRO 8 (OK)

*Aŭdu ĉapitron 8 ĉe interreto*
*http://www.monda.org/nesto/biblioteko/sonoj/Gerda08a.mp3*

En la universitata memserva restoracio, Linda sidas kaj pensas. Ŝi pensas ne tre trankvile. Fakte, ŝiaj pensoj iĝas pli kaj pli maltrankvilaj.

Ŝi observas la junan viron, kiu metis ion en la kafon de Gerda.

Ŝi pli kaj pli maltrankviliĝas.

Tom kaj Bob estas for jam longe. Ili ne revenas. Ĉu do vere okazis io al Gerda? Sed kio okazis? Ĉu io grava?

Linda observas la junulon kaj pensas:

"Kion mi faros, se li ekstaros kaj foriros?

"Ĉu mi sekvos lin? Ĉu mi sekvu lin?

"Kion mi faru, se li iros eksteren? Ĉu mi sekvu lin eksteren? Ĉu mi sekvu lin ekstere? Mi ne scias, kion mi faru. Mi ne scias, kion mi faros. Mi ne scias, ĉu mi sekvos lin aŭ ne.

"Kaj se li foriros en aŭto? Ĉu ankaŭ mi sekvu lin aŭte?

"Jam estas vespero. Baldaŭ venos nokto. Jes. Baldaŭ noktiĝos. Ĉu mi sekvu lin nokte?

"Kaj eĉ se li ne iros eksteren de la universitato, eĉ se li restos ĉi tie, ĉu mi sekvu lin?

"Se li eliros tra tiu ĉi pordo, li iros en la koridoron al iu ĉambro. Ĉu mi sekvu lin en la koridoron? Ĉu mi sekvu lin en la koridoro? Ĉu mi sekvu lin en la ĉambron, en kiun li eniros? Ne. Neeble. Mi atendos en la koridoro. Sed se nenio okazos? Se li restos longe plu en la ĉambro?

"Kaj se li eliros tra tiu pordo, li iros eksteren, verŝajne al la urbo. Ĉu mi sekvu lin al la urbo? Ĉu mi sekvu lin en la urbon? Ĉu mi sekvu lin en la urbo?

"Se li iros piede, eble li vidos min, verŝajne li vidos min. Li suspektos, ke mi lin sekvas. Li turnos sin al mi. Mi ektimos. Mi paliĝos kaj tuj poste ruĝiĝos. Ĉiaokaze, mi maltrankviliĝos. Jam nun mi maltrankviliĝas.

"Se li iros per buso, li eĉ pli certe vidos, ke mi sekvas lin, ĉar ni devos kune atendi ĉe la haltejo."

Linda ne sukcesas decidi, kion ŝi faru.

Ŝi timas. Ŝia koro batas rapide. Ŝi volus, ke Tom kaj Bob estu kun ŝi, ke ili helpu ŝin, ke ili helpu ŝin decidi. Ŝi estas tute sola. Ŝi sentas, ke ŝia koro rapidiĝas, sed ŝi ne scias, kion fari.

Kaj jen, antaŭ ol ŝi povis decidi, antaŭ ol ŝi sukcesis retrankviliĝi, jen la juna viro ekstaras. Li rigardas al la koridora pordo. Ĉu tien li iros? Li rigardas al la pordo, tra kiu oni eliras al la urbo. Ĉu tien? Jes, tien li iras.

Kaj Linda aŭtomate ekstaras kaj ekpaŝas al la sama pordo. Ne ŝi decidis. Ŝajnas, ke ŝia korpo decidis mem. Ŝajnas, ke ŝiaj kruroj agas mem. Nu, ĉiaokaze, jen Linda sekvas lin. Al kiu mistera destino?

## ***DEMANDOJ (8)***

Ĉu Linda estas trankvila?
 (jes / ne)
Ĉu Tom kaj Bob jam revenis?
 (jes / ne)
Ĉu Linda scias, kio okazis al Gerda?
 (jes / ne)
Kiu ekstaras kaj iras al la pordo?
 (Linda / Gerda / la juna viro, kiu metis ion en la kafon de Gerda /Bob / Tom)
Kiu sekvas?
 (Linda / Gerda / la juna viro, kiu metis ion en la kafon de Gerda /Bob / Tom)

## ***EKZERCOJ (8)***

("Berlino", "Londono" kaj "Parizo" estas urbo-nomoj.)
[Oni / Onin] sendis [mi / min] al [Berlino / Berlinon] por paroli kun la [spiono / spionon].
En [Berlino / Berlinon] mi atendis kvar [tagoj / tagojn] sed ne vidis [li / lin].
La [tuta / tutan] [tempo / tempon] ili observis la [virino / virinon] en [Londono / Londonon].
Ili sekvis [ŝi / ŝin] al [Parizo / Parizon], sed en [tiu / tiun]
[urbo / urbon] [ili / ilin] perdis [ŝi / ŝin].
Kiam [oni / onin] aŭdis [tiu / tiun] [novaĵo / novaĵon] el [Parizo /Parizon], [oni / onin] decidis, ke [mi / min] ne plu restu en la [urbo/ urbon].
*Ekzemplo:*
Vi parolu pri [vi / si].
→Vi parolu pri vi.

Nun faru vi:
Mi konas [min / sin]. Mi do ne volas vidi [min / sin] en la spegulo.
Tom estas pli bela ol mi, kaj mi ofte vidas lin rigardi [lin / sin] en la spegulo. Kiam li turnas [lin / sin] al mi, mi plene vidas [sian /lian] belan aspekton.
Ĉu vi volas piediri reen al [via / sia] ĉambro? Vi promenos longe, sed ne timu, ke [viaj / siaj] kruroj tro laboros kaj perdos [ilian / sian] tutan forton.
*Ekzemplo:*
Mi konas [mi* / si*] vizaĝon.

→ Mi konas mian vizaĝon.

Atente rigardu la tutan ekzercon unue!

Ĉu vi havas informojn pri Linda? Ŝi kuŝis en [ŝi* / si*] ĉambro kaj ne sentis [ŝi* / si*] tre bone. Tom iris al [ŝi* / si*] kun [li*/ si*] kuracisto, sed ŝi ne rigardis tiun kuraciston serioza. Ŝi preferis [ŝi* / si*] kuraciston; ŝi vere ne amas [li* / si*]. Li do forsendis [li* / si*] kaj vokis [ŝi* / si*]. Strange, kiam ŝi vidis [li* / si*] kuraciston, ŝi sentis [ŝi* / si*] malbone, sed tuj kiam ŝi vidis [ŝi* / si*] kuraciston alveni, ŝi jam sentis [ŝi* / si*] pli bone. Oni [oni* / si*] demandas, ĉu ŝi ametas [li* / ŝi* / si*] kuraciston.

# ĈAPITRO 9 (NAŬ)

"Ŝi kuŝas meze de la koridoro! Venu, venu tuj. Certe la afero urĝas," diras Tom.

Li rigardas la flegistinon: ŝi estas dika, grasa virino kun bluaj okuloj, ruĝaj haroj, kaj tre ronda vizaĝo. Jam kelkajn minutojn li provas diri, kio okazis, sed ŝajnas, ke tiu flegistino ne rapide komprenas. La vorto "urĝa" ŝajnas ne ekzisti en ŝia vortaro.

"Kuŝas, ĉu? Meze de la koridoro, ĉu vere?" ŝi diras.

Videble, la flegistino apenaŭ povas kredi.

"Kial, diable, ŝi kuŝus meze de la koridoro?" ŝi demandas.

"Mi petas, venu urĝe. Mi ne scias, kial ŝi kuŝas tie. Mi nur diras, kion mi vidis. Ni trovis ŝin tie. Eble ŝi estis malsana. Mi ne scias. Ŝi svenis, ŝi perdis la konscion. Nun certe oni devas urĝe okupiĝi pri ŝi."

"Stranga afero!"

"Nu, mi ne estas fakulo. Vi jes. Okupiĝi pri malsanaj homoj estas via fako, ĉu ne? Venu tuj. Urĝas!"

"Nu, nu, nu, nu. Kial, diable, ŝi svenis en la koridoro? Stranga ideo! Oni neniam svenas tie."

"Ĉu vere? Kie do oni svenas en ĉi tiu universitato? Pardonu min, sed mi ne konas la tradiciojn. Mi estas novulo. Apenaŭ unu semajnon mi estas ĉi tie."

"Juna viro, en ĉi tiu universitato, oni svenas en la klasĉambroj, oni svenas en la restoracio, oni svenas en la dorm-ĉambroj, oni svenas en la banĉambroj, eble eĉ oni povus sveni en iu administra oficejo. Sed pri sveno koridora mi neniam aŭdis. Stranga epoko! Stranga generacio! Oni faras ion ajn niaepoke."

"Vi parolas, parolas, paroladas, kaj dume tiu kompatinda knabino kuŝas en koridoro, kaj neniu zorgas pri ŝi!"

"Nu, nu, ne maltrankviliĝu, juna viro, ne havu zorgojn. Ni tuj rapidos tien, kaj mi tuj prizorgos ŝin."

Kaj ili kune rapidas al la loko, kie Tom lasis sian amikon kun Gerda.

Sed jen subite Tom haltas.

"Kio okazas? Kial vi ekhaltis?" demandas la flegistino.

"Ŝi estis ĉi tie, kaj ne plu estas, sed..."

"Sed estas iu alia, kaj _li_ estas senkonscia, ŝajnas al mi. Ĉu vi konas lin?"

"Jes, estas mia amiko Bob. Kio okazis al li?"

La flegistino iras al Bob, kiu falsidas ĉe la koridora muro. Ŝi tuŝas lian kapon.

"Batita! Oni batis la kapon al li!"
"Diable! Bob, Bob! Respondu! Ĉu vi aŭdas min? Diru ion, mi petas! Kio okazis?
Sed Bob ne respondas, kaj Tom iĝas pli kaj pli maltrankvila.

## *DEMANDOJ (9)*

Ĉu la flegistino venas tuj?
(jes / ne)
Ĉu oni ofte svenas en koridoro?
(jes / ne)
Kial Tom ekhaltas?
(Li estas novulo. / Gerda ne plu estas tie. / Okupiĝi pri malsanuloj ne estas lia fako.)
Kiu sidas ĉe la muro?
(Tom / Bob / linda / Gerda / la flegistino)
Ĉu Bob paroladas?
(jes / ne)

## *EKZERCO (9)*

Pri demandovortoj.
*Ekzemplo:*
___ vi iras? - Mi iras al la urbo.
→ Kien vi iras? - Mi iras al la urbo.

La demandovortoj jam lernitaj estas:
*kio, kion, kiu, kiun, kiel, kiam, kial, kie, kien, ĉu.*

Jen por vi:
___ diris la kuracisto? - Li diris, ke mi estu senzorga, ke mia malsano ne estas tro serioza.
___ vi resaniĝos? - Baldaŭ. Eble post kelkaj tagoj.
___ vi iros unue post la resaniĝo? - Unue mi iros en bonan restoracion.
___ vi iros sola? - Ne, amikoj iros kun mi.
___ helpas vin dum la malsano? - Mia amiko Petro.
___ estas via patrino? - En sia oficejo; ŝi devas multe labori tie.
___ vi ne povas iri piede? - Ĉar miaj kruroj estas tute senfortaj.

___ vi ekmalsanis? - Mi ekmalsanis tre subite.
___ tio okazis? - En mia laborejo.
___ ili metis en vian laborlokon? - Neniun, do la laboro restas nefarita kaj atendas min.
___ ili metis neniun en vian lokon? - Ĉar laboristo por mia laboro estas malofte trovebla.

# ĈAPITRO 10 (DEK)

Fakte, Tom ne estas ema fidi la flegistinon. Kial? Ĉu vi scias, kara amiko, vi kiu sekvas ĉi tiun aventuron ekde la unua vorto? Ĉu vi scias, kial Tom ne emas fidi la flegistinon?

Ne. Certe vi ne scias. Ankaŭ mi ne scias. Sed fakto restas fakto, eĉ se ni ne komprenas ĝin. Kaj la fakto estas, ke Tom ne emas ŝin kredi.

Tom estas agema knabo, eĉ iom aventurema, kaj eble tiu tro parolema flegistino ne ŝajnas al li kredinda. Eble li opinias, ke tiu flegistino tro emas paroli, kaj do ne estas fidinda. Aŭ ĉu temas pri io alia?

Tom ege ŝatas sian amikon Bob. Li ŝategas lin. Li lin amas, fakte. Bob kaj li amikiĝis antaŭlonge en la urbego, kie ili vivis tiutempe -- ili dumtempe eĉ iradis al la sama lernejo -- sed poste Tom devis iri al malsama urbo, kaj ili ne plu vidis sin reciproke. Kiam, antaŭ kelkaj tagoj, ili retrovis unu la alian en la sama universitato, ambaŭ ege dankis la destinon.

Ili treege ŝatas la tiean bonegan vivon. Ili ŝategas ĝin. Ambaŭ estas agemaj, laboremaj knaboj, kun speciala ŝato al la iom timemaj studentinoj. Eble ĉar timema junulino estas malpli timinda ol ino neniam ema timi, ol sen-tim-ulino. Ĉu vi komprenas?

Sed nun Tom malŝatas la aventuron. Li sin demandas, kial li sentas tiun flegistinon nefidinda. Li preferus silenteman, grav-aspektan sinjorinon. Tiu ĉi ne aspektas tre zorgeme, kaj li ne trovas ŝin atentema pri liaj demandoj. Verdire, li opinias ŝin ema fuŝi sian laboron. Li timas, ke ŝi ofte agas fuŝe. Fuŝemaj homoj ekzistas en la mondo. Kial tiu tro parolema flegistino ne estus unu el ili? Ĉu li mispaŝis, kiam li turnis sin al ŝi? Sed al kiu alia li povus sin turni? Ŝi estis la sola flegistino, kiu troviĝis en la universitato. Aŭ ĉu li mispensas?

Kaj nun li sentas sin ema zorgi pri Linda. Ĉu tiu belega knabino ne troviĝas en danĝero? Li amas ŝin, li eĉ amegas ŝin, pli kaj pli, kaj la ideo, ke danĝeraj homoj povus fari ion al ŝi, apenaŭ estas travivebla. La vivo ne estas facila, kaj ŝajnas nun, ke la tuta afero iĝas pli kaj pli malŝatinda.

## *DEMANDOJ (10)*

Kiu ne emas fidi la flegistinon?
 (Tom / Bob / Linda / Gerda / la blondulo)
Kie Tom kaj Bob retrovis sin reciproke?
 (en lernejo / en universitato / en la urbego, kie ili vivis tiutempe)
Estas ___ flegistino(j) en la universitato.
 (unu / du / tri / kvar / kvin)
Pri kiu zorgas Tom?
 (pri Bob / pri Gerda / pri Linda / pri la flegistino)
Ĉu Tom ŝatas la novan aventuron?
 (jes / ne)
Kiun amas Tom?
 (Gerdan / Lindan / Rongan / la flegistinon)

## *EKZERCOJ (10)*

*Ekzemplo:*
Tom [*] Linda estas student[*].
---> Tom kaj Linda estas studentoj.
*Nun faru vi:*

Tom [*] Linda estas student[*]. En universitat[*] restoraci[*] ili observas blond[*] junul[*], kiu agas plej strange: Dum li parolas [*] knabino, li kaŝ[*] metas io[*] en ŝi[*] kafotaso[*].

Eble estis drogo, ĉar tuj post ki[*] ŝi ekstaras kaj forlasas la restoracio[*], [*] la koridoro[*] ŝi jam perdas la konscion. Intertemp[*], Bob sid[*]is ĉe Tom kaj Linda.
Li povas rakont[*] al ili[*], ki[*] estas la knabino: Ŝi estas Gerda, nova instruist[*] pri kriptaĵoscienco ([*]novaj sekretaj lingvoj). Ronga, la profesoro pri lingvistiko, volis, ke ŝi ven[*] al la universitato [*] instru[*] kaj labor[*] kun li.

Kiam ili aŭdas ŝi[*] falbruon el la koridor[*], Bob kaj Tom rapidas por helpi ŝi[*]. Bob metas ŝin bone, tiel [*] ŝi kuŝu komforte, kaj Tom ir[*] vok[*] flegistinon.

Tiu flegistino, dika, grasa kaj parolema, nur post long[*] diskut[*] kun Tom konsciiĝas [*] tio, ke la afero urĝas. Se ŝi est[*] pli zorgema, ŝi [*] rapidus kaj eble ne okazus jeno:

Kiam Tom fine [*]venas kun la flegistino, Gerda estas for, kaj Bob sidas ĉe la koridor[*] mur[*], bat[*]a surkape. Kion [*]tempe faras Linda? Ŝi pli kaj pli [*]trankvil[*]as, lasite sola [*] la universitata restoracio kun la blond[*] strang[*].

Ŝi observ[*] lin, kaj kiam li eliras tra la pordo alurb[*], ŝi[*] sekvas li[*]. Linda estas junulino iom tim[*], certe belega. Tom am[*]as ŝin; li havas okulojn nur [*] ŝi.

Li zorgas pri ŝi. Ĉu ŝi trov[*] en danĝero? Ki[*], fakte, ŝi iros? Kaj Gerda, kien ŝi[*] foriĝis? Ki[*] okaz[*] kun ŝi? La afero [*] pli kaj pli mistera!

# ĈAPITRO 11 (DEK UNU)

Linda ekhavis ideon. Ŝi aliris la junan blondan viron, dum li proksimiĝis al sia aŭto, kaj alparolis lin:

"Sinjoro, ĉu vi bonvolus helpi al mi?"

Li turnis sin al ŝi kun vizaĝo ŝajne ne tre kontenta, kaj ŝin rigardis dum longa senvorta minuto.

"Kiel mi povus vin helpi?" li fine demandis, kaj li tuj aldonis: "Bonvolu pardoni min, se mi respondas nee, sed al mi tempo vere mankas. Mi devas urĝe veturi al la urbo."

"Ĝuste tiel vi povas min helpi. Mia aŭto paneas. Io estas fuŝita en ĝi. Mi ne sukcesas ĝin irigi..."

"Pardonu min, sed mi ne sukcesus rebonigi la aferon, eĉ kun plej granda bonvolo. Pri mekaniko mi scias nenion. Mi ĉiam miras vidi, ke veturiloj entute funkcias. Kiam mi vidas motoron, ĉiam mirigas min, ke tia ŝajne senorda aranĝo de pecoj kaj objektoj igas aŭton iri. Mi..."

"Mi ne petas vin ripari mian veturilon, vi min miskomprenis. Mi demandas nur, ĉu vi bonvolus akcepti min en via aŭto ĝis la urbo."

La ideo de Linda estis jena: sekvi lin estus danĝere, sed se li veturos aŭte, mi petos lin akcepti, ke mi veturu kun li, kaj dum la veturado mi igos lin paroli. Mi diskrete faros ŝajne banalajn demandojn, kaj paroligos lin. Tiel mi scios kiel eble plej multe pri li.

"Nu, bone," li fine konsentas. "Konsentite, venu." Kaj li malfermas la pordon de la aŭto por ŝi.

"Dankon, vi vere estas tre afabla. Tio ege helpas min. Mi plej sincere dankas."

"Ne dankinde," li respondas, iom seke. Kaj li ekirigas la motoron.

"Mi ne ŝatas la ideon, ke mi devos venigi ripariston, mekanikiston," ŝi diras. "Mi tute ne ŝatas aŭtojn, fakte. Mi havas veturilon, ĉar estas tre oportune, sed mi ne ŝatas aŭtojn."

La alta junulo nur silentas.

"Ne estas facile igi lin diri ion," pensas Linda, iom zorge, sin demandante, ĉu estis saĝe enmiksi sin en tiun aventuron. Ŝi forte deziras lin paroligi, sed samtempe timas malkontentigi lin. Neniam estas facile trovi plene kontentigan manieron agi.

"Ĉu ĝenas vin, se mi parolas?" ŝi demandas, "vi eble estas silentema."

"Mi havas zorgojn," li respondas.

"Mi ne volas ĝeni vin. Estas jam tiel bonkore, ke vi min veturigas. Mi vere sentas grandegan dankemon al vi."

"Ne dankinde," li ripetas, kaj silentas plu, pripensema.

## *DEMANDOJ (11)*

De kiu Linda petas helpon?
Ĉu la juna blonda viro estas kontenta?
Kien la blondulo volas veturi?
Kion volas Linda de li?
Ĉu la blondulo konsentas?
Pri kio Linda parolas dum la veturo?
Ĉu la blondulo estas parolema?

## *EKZERCOJ (11)*

*Ekzemplo:*
Tio facil[iĝ / ig]as la laboron. La laboro facil[iĝ / ig]as.
→ Tio faciligas la laboron. La laboro faciliĝas.
Faru vi:

Mi volis aspekti pli bele ol normale. Mi [iĝ / ig]is min pli bela antaŭ la promenado. Antaŭ la promenado, mi [iĝ / ig]is pli bela.

Penjo ridis pri mi, ĉar mi plibel[iĝ / ig]is min. Ni veturis en la urbon. Vetur[iĝ / ig]is nin Penjo. Ŝi [iĝ / ig]is mia amiko tuj post mia unua tago en la laborejo. Antaŭ la forveturo, ŝi trovis min en mia ĉambro, kie mi plibel[iĝ / ig]is.

La urbo trov[iĝ / ig]as tro malproksime de nia laborejo por iri piede. Penjo ne havas aŭton, sed ŝi sukcesis hav[iĝ / ig]i al si la aŭton de Bob.

Post longa promenado en la urbo, ni volis eksidi en trinkejo. Tuj post kiam ni sid[iĝ / ig]is ĉe tablo, iu ulo turnis sin. Li turn[iĝ / ig]is al ni kaj ekrigardis nin. Ni eksentis nin malbonaj. Lia rigardado malbonsent[iĝ / ig]is nin. Ni devis agi. Ni ne plu restis sidaj, ni restar[iĝ / ig]is, tiel dev[iĝ / ig]ante lin forturni sin. Li komprenis, ke li ĝenis nin ade rigardante al ni. Ni kompren[iĝ /ig]is al li, ke rigardado povas esti maldiskreta.

Mi lernas multon en la urbo. Ĝi lern[iĝ / ig]as min pri la vivo. Multhoma kunvivado lern[iĝ / ig]as kvazaŭ aŭtomate en la urbo.

# ĈAPITRO 12 (DEK DU)

Bob duone malfermas la okulojn, ilin refermas, ilin malfermetas denove, ilin refermas, ĝemas, kaj finfine malfermas ilin tute larĝe.

"Donu al mi ion por trinki," li diras.

"Trinki? Kion vi deziras trinki?" demandas Tom.

"Ion ajn. Brandon. Donu al mi glason da brando."

"Kiel vi sentas vin?" diras fraŭlino Marta, la flegistino.

"La kapo doloras," Bob respondas ĝeme. "Mi petas vin, bonvolu doni al mi ion por trinki."

"Ĉu vi bonvolas iri," Tom petas la flegistinon, "kaj alporti al li glason da brando?"

La flegistino iom hezitas, sed fine kapjesas.

"Ĉu mi ankaŭ voku la policon?" ŝi diras. "Li ja ricevis baton, baton sufiĉe fortan, por ke li iĝu senkonscia. Laŭ mia opinio, tio pravigas, ke oni venigu la policon. Ĉu vi ne konsentas?"

"Ankaŭ akvon," diras Bob, antaŭ ol Tom trovas la tempon respondi al Marta. "Mi tre soifas. Mi trinkos brandon plezure, sed unue mi trinku akvon. Bonvolu alporti al mi tre grandan glason da akvo kaj iom grandan glason da brando."

"Jes. Estus saĝe voki la policon," Tom respondas al la flegistino.

"Se vi ne alportos al mi ion por trinki, mi iros mem," diras Bob. "Mi tre soifas. Vi ne povas imagi, kiom soifa mi min sentas. Mi tuj iros trinki akvon. Kaj poste mi iros aĉeti brandon. Ĉu oni povas ricevi brandon en la memserva restoracio?"

"Ne, tute ne," Marta respondas, "sed mi havas brandon en mia ĉambro. Mi alportos ĝin al vi. Aŭ venu mem, se vi povas. Ĉu vi povas stariĝi?"

"Mi povas," diras Bob, tre malrapide stariĝante kun la helpo de Tom kaj de la flegistino, "kvankam dolore."

Ili iras al ŝia ĉambro.

"Trinku tiom da akvo, kiom vi deziras, " ŝi diras. "Kaj poste mi donos brandon al vi. Eksidu sur tiun seĝon, ĝi estas tre komforta, vi vidos."

Bob sidiĝas sur la seĝon, iom ĝemas, kaj ricevas grandan glason da akvo kun videble grandega plezuro. "Doloras al mi la kapo," li diras.

"Diru," petas Tom, "kio okazis. Ĉu finfine vi klarigos al ni? Ni estas ege scivolaj."

Bob pripensas iomete, trinkas iom da akvo, metas la manon al la kapo kun dolora esprimo survizaĝe, kaj fine respondas:

"Mi ne povus klarigi. Nenio estas klara. Mi estis tie apud Gerda. Mi aŭdis nenion, mi aŭdis neniun bruon. Kaj subite ĉio eksplodis en mia kapo kaj mi mortis."

## *DEMANDOJ (12)*

Kion Bob tuj deziras?
Kie oni povas trovi brandon?
Kion Bob trinkas unue?
Ĉu li povas bone klarigi, kio okazis?
Ĉu li aŭdis bruon?
Ĉu Bob vere mortis?

## *EKZERCOJ (12)*

Forigu la vortojn kun "{}"!
*Ekzemploj:*
Marko ŝatas {la} aŭton {de Marko}.
→ Marko ŝatas sian aŭton.
{Petro} ŝatas {la} aŭton {de Ivano}.
→ Li ŝatas lian aŭton.

Por vi:

{Linda} rigardas al {Linda} en la spegulo.
{Tom} rigardas al {la blondulo}.
{Tom} rigardas al {la} kunulo {de Tom}.
{Tom} rigardas al {la} kunulo {de la blondulo}.
{La} amiko {de Bob} amas {Lindan}.
{La} amikino {de Tom} rigardas {la amikinon de Tom} en la spegulo.
{La} amikino {de Ivano} amas {Ivanon}.
{La blondulo} estas en {la} aŭto {de la blondulo}.
Gerda estas en la aŭto de {la} amiko {de Gerda}.
{Petro kaj Ivano} kaŝas {Petron kaj Ivanon} sub la tablo.

# ĈAPITRO 13 (DEK TRI)

La vojo ŝajnas longa, kiam oni silentas la tutan tempon. Linda estas parolema; krome, ŝi deziras ricevi informojn pri sia stranga kunulo; ŝi do tute ne ŝatas tiun longan silentadon. Kial ne provi denove? Ŝi decidas, ke ŝi rekomencos paroli. Se li ne ŝatos, nu, li esprimos sian malŝaton, kaj ili plu veturos senvorte, kaj la vojo plu ŝajnos longega.

"Vi diris...," ŝi komencas, ne sciante, kiel ŝi finos, sed feliĉe ideo tuj venas: "Vi diris, ke vi havas zorgojn. Nu, ofte oni sentas sin pli bone, kiam oni esprimas siajn zorgojn al iu."

"Vi estas scivolema, ĉu ne? Nu, mi ne volas esti malafabla kun tiel bela knabino, kiel vi. Pardonu, se mi ne montras min pli amikiĝema. Sed miajn zorgojn mi ne povas klarigi."

"Ĉu vi estas certa? Oni ofte imagas, ke afero estas neebla, ĉar oni ne scias, kiel komenci, sed..."

"Ne. Kiom koncernas min, ne estas tiel. Mi ne povas rakonti pri miaj zorgoj, ĉar ili koncernas personojn, pri kiuj mi ne rajtas paroli. Oni devas esti diskreta, ĉu ne? Ĉu vi ŝatus, ke viaj amikoj rakontu ĉion pri vi al nekonato?"

"Kompreneble ne. Mi bone komprenas vin. Fakte, mi ne estas speciale scivola. Mi komencis diri tion nur, ĉar mi trovis la silenton peza kaj la vojon pli kaj pli longa. Sed mi tute ne volus maldiskreti."

"Estas fakto, ke oni kutime interparolas, kiam oni veturas kune. Mi verŝajne ne estis tre ĝentila, lasante tiun silenton daŭri kaj daŭri pli kaj pli peze por vi. Mi eĉ ne rimarkis, ke silento estiĝas kaj daŭras. Mi estis absorbita de miaj pensoj, de miaj zorgoj, kaj ankaŭ de la vojo. Oni devas atenti la vojon, kiam oni ŝoforas, ĉu ne? Strange, kvankam vi estas tre bela kaj sidas tuj apud mi, plej proksime al mi, mi tamen forgesis pri vi. Nur ekzistis por mi la vojo en miaj okuloj, kaj la zorgoj en mia kapo."

"Ĉe mi okazis la malo. Mi daŭre pensis pri vi. Mi rimarkis, ke vi ne aspektas tre ĝoje. Vi ŝajnis malfeliĉa. Mi min demandis, ĉu mi povus helpi. Vi ja tre afable konsentis min veturigi. Mi sentas min danka. Mi volus redoni al vi similan servon. Mi opiniis, ke se mi helpas vin vortigi vian malĝojon, tio eble

senpezigos vin, kaj mi estos kontenta agi helpe. Eble estas stulte, sed mi ĉiam deziras feliĉigi la homojn."

"Vere, vi estas tre bonkora. Mi ege bedaŭras, ke mi ne povas jesi al via propono. Sed, kiel mi jam diris, miaj zorgoj koncernas aferojn, pri kiuj mi ne rajtas rakonti. Nu, jen ni alvenas. Kie vi deziras, ke mi lasu vin?"

"Kien precize vi iras? Kie vi haltos? Kie vi lasos la aŭton? Vi povus lasi min tie. Estos plej facile por vi."

"Ĉiam scivola, ĉu ne? Vi ŝatus scii, kien mi iras," li diras ridante, dum Linda sentas sin ruĝiĝi, ĉar similan rimarkon ŝi tute ne atendis. Dum momento, ŝi ne scias, kiel respondi. Ŝi sentas sin stulta.

"Tute ne," ŝi fine diras, malvere. "Kien vi iras, tio tute ne interesas min. Mi proponis tion nur, ĉar tio ŝajnis plej facila. Sed se ĝenas vin, ke mi scios, vi povas lasi min ie ajn en la centro. Ekzemple ĉe la Internacia Hotelo, aŭ ĉe la Granda Teatro. Ĉiaokaze, mi treege dankas vin kaj mi facile trovos mian vojon. Jen. Tie ĉi estas perfekte. Koran dankon, kaj ĝis revido, kara sinjoro."

"Ĝis revido, kara spionino!"

La aŭto forveturas, kaj Linda ne povas forturni la okulojn de ĝi. Kara spionino, vere! Kion li volis diri? Ĉu li suspektus? Nia kompatinda Linda ne scias, kion pensi.

## *DEMANDOJ (13)*

Kie sidas Linda?
Kial ŝi volas paroli kun la blondulo?
Ĉu la blondulo volas klarigi siajn zorgojn?
Kiel Linda klarigas sian scivolon?
Kien precize veturas la blondulo?
Kie nun staras Linda?
Kion ŝi timas vidante la forveturantan aŭton?

## *EKZERCOJ (13)*

*Ekzemplo:*
faradi :
→ faradi : agi

Trovu la vortojn!
antaŭa parto de la kapo :
atentinda :
centro de supera instruado :
ĉi tiam :
diri "bonan tagon" :
dudek kvar horoj :
eltrovisto de sekretoj :
en la tempo de :
faradi :
fina parto de brako :
havanta ĝustan opinion :
irigi laŭ la ĝusta vojo :
juna vira homo :
kiun oni amas aŭ ŝatas :
konsenti, ke iu faru ion :
lernanto ĉe universitato :
malnormala :
ne konata, ne komprenata :

ne la sama :
ne ludema, grava :
nek kuŝi, nek sidi, nek iel moviĝi :
pala koloro de haroj :
peti informon :
pli ŝati :
sciigi, ke oni volas ion ricevi :
sin movi piede :
ŝajni laŭvide :
ŝategi :
tie, kie muroj kuniras :
videbligi :

La vortoj estas:
*agi, alia, ami, angulo, aspekti, blondo, demandi, direkti, dum, grava, iri, kara, knabo, mano, mistera, montri, nun, permesi, peti, prava, preferi, serioza, saluti, spiono, stari, stranga, studento, tago, universitato, vizaĝo.*

# ĈAPITRO 14 (DEK KVAR)

"Kie diable mi troviĝas?" diris al si Gerda, kiam ŝi vekiĝis. Ŝi kuŝis sur lito -- sur malkomforta, tro mallarĝa lito -- en ĉambro nekonata, en domo nekonata.

Mankis al ŝi forto, kaj ŝia tuta korpo iom doloris; ŝi estis laca, kvazaŭ ŝi estus laborinta multajn horojn sinsekve en la kampoj, kvazaŭ ŝi estus movinta pezajn rokojn kaj ŝtonojn dum multaj kaj multaj tagoj, sen eĉ horo da dormo, kvazaŭ ŝi estus marŝinta dum multaj kaj multaj semajnoj sur malfacila monta vojeto. Unuvorte, ŝi estis lacega, kaj ŝajnis al ŝi, ke ĉiuj muskoloj de ŝia korpo plendas pri troa laboro, nehome peza, nehome malfacila, nehome laciga.

Kaj tamen ŝi sciis, ke ŝi faris neniun korpan laboron; ŝi sentis sin malĝoja; ŝiaj okuloj malsekiĝis; ŝi ploris.

Ne estis multe da lumo en la ĉambro. Kvankam ŝi sentis sin tiel laca, tiel senforta, scivolo pri la situacio tamen superis ŝian deziron plu kuŝi. Ŝi sekigis siajn okulojn kaj ellitiĝis. Ŝi iris al la eta fenestro, esperante malfermi la dikajn fenestrokovrilojn, kiuj malhelpis la envenon de lumo. Ŝi ankaŭ esperis, ke ŝi vidos la sunon. Krome, estis tre varme en la ĉambro, kaj estus saĝe malfermi la fenestron por enlasi iom da pura aero. Sed ŝi ne sukcesis. Io malhelpis, ke tiu malnova fenestro moviĝu.

Ŝi iris al la pordo; ĝi estis ŝlosita, kaj ŝlosilo nenie videblis.

La ĉambro estis malbela, ne tre pura. Apud la muro staris tablo kaj seĝo. Ŝi sidiĝis sur la seĝon, metis la brakojn sur la tablon, la kapon en la manojn, kaj ploris. "Enŝlosita mi estas," ŝi pensis. "Oni enŝlosis min!"

Antaŭe ŝi ne multe pensis pri la plezuro esti libera. Liberi estis io perfekte natura: ŝi iris, kien ŝi deziris, sen iu ajn malhelpo, kaj tiu libereco ŝajnis rajto evidenta. Kaj nun oni malliberigis ŝin malantaŭ ŝlosita pordo. Ŝi, kiu tiom ŝatis ĝoji, ridi, kanti, kiu tiom ŝatis ludi kaj promeni sub la suno, nun ne plu trovis en si la humuron, kiu tiom ofte helpis ŝin en la malfacilaj horoj de la vivo. Ŝi ne povis vidi la eksteran sunon, kaj same en ŝia koro ne plu lumis la kutima suno de ĝojo.

Kaj jen subite ŝi reagis: ŝi iris al la pordo kaj ĝin batis kun plej granda forto; ŝi faris timigan bruon, sed nenio okazis. Ŝi vokis pli kaj pli laŭte, kriis, kriegis, samtempe piedbatante la pordon, sed venis neniu respondo, neniu reago. Senespera, ŝi revenis al la lito kaj rekuŝiĝis, pli laca ol iam ajn. Dum multaj horoj ŝi restis tiel, kuŝe, kaj fine, tro laca, ŝi ekdormis.

Vekis ŝin infana voĉo; ĝi venis el iu alia ĉambro, en la sama domo, tute certe; ĝi diris: "Neniam diru nek al via patro nek al via patrino, ke ni venis en la forlasitan domon. Estas malpermesite ludi ĉi tie. Se ili scius..." Alia voĉeto

respondis: "Mi neniam diros. Nek al mia patro, nek al mia patrino. Ne havu zorgojn. Neniam oni scios, ke ni venis ludi ĉi tie."

Gerda diris: "Infanoj, ĉu vi aŭdas min?" Ŝia koro batis espere.

"Iu parolis," sonis unu el la infanvoĉoj, sed aŭdeble la knabo ne parolis al Gerda, nur al sia kunulo. "Ĉu vi aŭdis?"

"Estis kvazaŭ voĉo de virino," diris la alia.

"Infanoj, venu, helpu min, mi estas mallibera, oni ŝlosis la pordon, mi estas enŝlosita, venu, mi petas, mi petegas, liberigu min," Gerda plu petegis. Sed la reago de la infanoj estis plej senkuraĝiga.

"Venu!" kriis unu. "Estas fantomo!"

"Vi pravas," la dua respondis, "oni ĉiam rakontis pri fantomo en ĉi tiu forlasita domo. Fantomino, oni diris, kaj la voĉo estis ina. Ni rapide forkuru!"

"Mi timas," ankoraŭ diris la unua, dum la bruoj klarigis al Gerda, ke la du knaboj forkuras kaj lasas ŝin sola, sola, sola...

## *DEMANDOJ (14)*

Ĉu Gerda sciis, kie ŝi estas?
Kiel aspektis la ĉambro, en kiu Gerda kuŝas?
Kial Gerda estis lacega?
Ĉu ŝi ŝatis sian malliberecon?
Kiel ŝi provis liberiĝi?
Kio vekis ŝin?
Pri kio la infanoj parolis?
Kial la infanoj ne helpis ŝin?
Kun kiu Gerda estis post la forkuro de la infanoj?

## *EKZERCOJ (14)*

*Ekzemplo:*
parto :
→ parto : peco

Trovu la vortojn!
afero :
akiri scion :
aspekti :
diri reage al demando :
dormigilo :
en kiu tempo :
enhavanta ĉion enhaveblan :
facile videbla, komprenebla :
fari por si ideon pri io :
havi ideon pri :
havi similan opinion :
io el tre malgrandaj partetoj :
io, kio restu kaŝita, ne konata :
iradi pro plezuro :
komunikaĵo :
kontraŭ la normala saĝo :
lernigi :

malgranda :
malmontri :
malproksima :
parto :
pensaĵo :
pli alta ol :
rapida, ne atendita :
rilatanta duo :
sciigi, konigi :
tio, pri kio io estas :
veraĵo :
voli havi :
vorto, per kiu persono estas konata :

La vortoj estas:
*absurda, aĵo, deziri, drogo, eta, evidenta, fakto, fora, ideo, imagi, instrui, kaŝi, kiam, komuniki, koni, konsenti, lerni, mesaĝo, nomo, paro, peco, plena, promeni, pulvoro, respondi, sekreto, subita, super, ŝajni, temo.*

# ĈAPITRO 15 (DEK KVIN)

"Bonan matenon, ho plej bela, ĉu vi bone dormis?"

"Bonan matenon, Tom. Mi ne dormis tre multe. Kaj vi, ĉu vi dormis kontentige?"

"Perfekte, kara, perfekte. Sed diru do al via plej fidinda amiko, kial vi ne sufiĉe dormis."

"Ĉu ne estas klare al vi? Mi tro pensis. Mi pensadis tutnokte pri ĉio, kio okazis hieraŭ."

"Estas fakto, ke mi ne revidis vin hieraŭ, post kiam mi eliris kun Bob por okupiĝi pri Gerda. Ni lasis vin en la memserva restoracio kun la tasko observi la blondulon. Kiam mi revenis, vi estis for. Kien vi iris? Ĉu vi faros al mi precizan raporton?"

"Kun plezuro, sed ankaŭ vi raportos al mi poste, ĉu ne? Nu, mi veturis al la urbocentro kun tiu junulo. Mi rakontis al li, ke io fuŝa okazis al mia aŭto, kaj mi petis lin min veturigi. Li hezitis, sed fine decidis jese. Mi deziris lin paroligi, por ekscii pri li kiel eble plej multe, sed mi ne sukcesis. Ni diris unu al la alia nur tre banalajn aferojn."

"Ĉu vi almenaŭ scias, kien li iris en la urbo, laŭ kiuj stratoj, al kiu domo?"

"Atendu. Mi rakontos ĉion. Por ke mia peto ŝajnu natura, mi petis lin lasi min en la centro. Li lasis min ĉe la dekstra flanko de la Granda Teatro, kaj li veturis plu. Mi ne sciis, kion fari. Mi promenis en la urbo, pensante, ke mia ideo ne estis tiel bona: mi eksciis nenion pri li, kaj troviĝis sen aŭto en la mezo de la urbo. Fakte, mi sentis min iom stulta. Mi promenis de strato al strato, provante elpensi planon, kaj jen subite mi vidas lin eliri el la poŝtoficejo. Mi estis nekredeble bonŝanca. Imagu! Se mi estus troviĝinta naz-al-naze kun li ĝuste kiam li eliris el la poŝt-oficejo...! Sed mi vidis lin sufiĉe frue por min kaŝi."

"Feliĉe, ke vi vidis lin sufiĉe frue!"

"Kiel mi diris: mi estis bonŝanca, mi vidis lin ĝustatempe. Nu, li iris piede, kaj mi decidis lin sekvi. Ĉu vi konas tiun grandan magazenon, kiu vendas kvardek malsamajn specojn de pano kaj ĉiaspecajn ĉokoladojn kaj aliajn dolĉaĵojn? Sur la maldekstra flanko de la strato, kiu iras al la Ĉefa Sportocentro. Estas granda vendejo de mebloj apude. Nu, ne gravas, ĉu vi konas aŭ ne. Li eniris tiun panejon, aŭ tiun dolĉaĵvendejon, aŭ tiun... nu... tiun pan- kaj dolĉaĵvendejon, kaj eliris post minuto portante paperan sakon, kiu aspektis plenplena. Ŝajnis, ke li aĉetis la tutan magazenon. Mi devas diri, ke ili vendas

tre bonajn aĵojn en tiu ejo. Mi, kiu tiom ŝatas ĉokoladon kaj dolĉaĵojn, ofte irus tien kaj aĉetus multon, se mi ne timus dikiĝi. Nu...e... kion mi rakontis?"

"Vi raportis pri via spiona sekvado, sed vi devojiĝis de la ĉefa vojo de via raporto al flankaj konsideroj pri pano kaj ĉokolado. Fakte, ĉu vi deziras iom pli da pano? Kion vi trinkas ĉi-matene? Teon, mi vidas. Ĉu vi ŝatus, ke mi replenigu vian tason?"

"Jes, dankon. Mi plezure trinkos plian tason da teo. Dankon, Tom, kara. Nu, do..."

## *DEMANDOJ (15)*

Kun kiu parolas Tom?
Ĉu ŝi bone dormis?
Ĉu Tom raportas unue?
Ĉu ŝi sukcesis paroligi la blondulon en la aŭto?
Kie ŝi poste vidis lin?
Kion la blondulo aĉetis?
Kial Linda ofte irus al la vendejo por multon aĉeti?
Kial ŝi tamen ne faras tion?
Kion trinkis Linda?

## *EKZERCOJ (15)*

*Ekzemplo:*
ne alia :
→ ne alia : sama
Trovu la vortojn!
al ekster :
atente rigardi :
ĉiuj el la du :
danĝero, necerteco :
daŭre esti en la sama loko :
ekmalhavi :
esti senkonscia, sed sana :
faciligi la agadon :
fina parto de kruro :
interparoli pri io :
io, kio funkcias per si mem :
iri malantaŭ io :
laŭte peti, ke iu venu :
malbela aŭdaĵo :
maltago :
motora veturilo :
ne alia :
ne en :

ne esti mortinta :
noktiĝo :
parto de domo :
parto de la korpo, kie estas la okuloj :
pensanta :
post mallonga tempo :
resanigi :
doni sciigon :
sep tagoj :
tio, kion oni pensas pri iu temo :
tomatokolora :
zorgi pri malsanulo :
La vortoj estas:
*ambaŭ, aŭto, aŭtomato, baldaŭ, bruo, ĉambro, diskuti, dormi, ekster, el, flegi, helpi, informi, kapo, konscia, kuraci, nokto, observi, opinio, perdi, piedo, resti, risko, ruĝa, sama, sekvi, semajno, vespero, vivi, voki.*

# ĈAPITRO 16 (DEK SES)

"Kie mi estis en mia raporto? Ha jes! Mi memoras. Li eliris el tiu vendejo kun papera sako plena je dolĉaĵoj."

"Eble estis ĉefe pano."

"Prave, eble pano. Ĉiaokaze, jen mi ekvidis lian aŭton, kiu staris flanke de la strato. Mi pensis: nun li forveturos aŭte, kaj mi ne plu povos sekvi lin. Sed ne. Li nur iris porti tiun sakon al la aŭto, ĝin metis en ĝin, reŝlosis la aŭtopordon, kaj plu piediris. Nur tiam mi havis la ideon noti la numeron de lia aŭta numerplato. Mi do eksekvis lin plu. Li paŝis sur la dekstra flanko de la strato, kaj mi sekvis iom malproksime sur la maldekstra flanko."

"Ĉu li rimarkis, ke vi lin sekvas?"

"Certe ne. Subite, li eniris restoracion. Mi hezitis: ĉu ankaŭ mi eniru? Aŭ ĉu mi tro riskos, ke li vidos kaj rekonos min? Unuflanke, mi deziris spioni lin. Aliflanke, la risko, ke li rekonos min, estis reala, kaj min ĝenis. Dum mi staris tie hezitante, eniris la restoracion grupo da soldatoj, eble ok aŭ naŭ, junaj viroj, kiuj militservis, videble. Dum ili eniris kaj la pordo estis malfermita, mi vidis, ke la restoracio estas granda kaj plena je homoj. Mi sekvis la ok aŭ naŭ soldatojn kaj trovis sidlokon ne tre videblan de la loko, kie mia blondulo ĵus eksidis."

"Li do estas _via_ blondulo, ĉu?"

"Ne parolu malsaĝe. Vi perfekte scias, kion mi volas diri. Estis turka aŭ pseŭdoturka restoracio, kun stranga muziko kaj strangaj vestaĵoj. La kelneroj estis vestitaj per t.n. (=tiel nomataj) naciaj vestoj multkoloraj. Mi manĝis bonegan supon, sed poste ion, pri kio mi ankoraŭ nun min demandas, ĉu estis pecoj el hundo aŭ kato. Certe ne estis kokidaĵo, sed krom tio mi havas neniun certecon. Ankaŭ la salato estis tre bona, sed la kuko estis treege dolĉa, tro dolĉa por mi, kaj same la turka kafo; ĝi estis nekredeble plena je sukero, kaj mi manĝis tiom da kafpulvoro, kiom mi trinkis da kafo."

"Mi miras pri la grava loko, kiun konsideroj pri manĝo kaj trinko okupas en via spionraporto. Mi atendis aventurojn, sed venas ĉefe menuoj."

"Ne ridu pri mi, aŭ mi ne daŭrigos la rakonton. Okazis io. Du el la soldatoj estis furiozaj, ĉar la kelnero ne volis porti al ili bieron. Ili faris bruegon, kriegis, kriaĉis, la aliaj provis ilin silentigi, kaj finfine speco de milito komenciĝis inter ili. Ili ekbatis unu la alian kun rimarkinda forto. Subite, jen unu telero flugis tra la aero, poste du, tri, kvar, kvin aliaj teleroj, unu taso eĉ flugis ĝis la plafono..."

"Kia ĝojo! Kia plezuro! Kiajn perfektajn amikojn vi trovis!"

"Ĉefe, kia bruo! Ŝajnis, ke ili rompas mil glasojn samtempe, dum cent viroj kune kriaĉas, kaj dek muzikistoj provas kune superi la bruon de la telera milito."

"Tre bela atmosfero, ĉu ne? Mi gratulas vin. Estis kuraĝe resti tie."

"Jes. Kia vivo! Cetere, mi estas kuraĝa, ĉu vi neniam rimarkis?"

"Mi ne konas vin sufiĉe, sed via kuraĝo ne mirigas min. Bela, kuraĝa, riskema, aventurema, bonkora: vi estas la perfekta virino. Sed pri via perfekteco ni havos aliajn okazojn paroli. Kio okazis post la telera, glasa kaj turkakafa milito?"

"Mi rimarkis tre bedaŭrindan aferon, nome, ke la blondulo ne plu troviĝas en la restoracio. Li certe foriris, dum mi tiom interesiĝis pri la intersoldata milito. Mi vere bedaŭras mian mankon de observemo. Sed kion fari? Bedaŭri ne helpas, Mi fuŝis mian taskon. Mi provos ne fuŝi ĝin alifoje."

"Nu, prave, estas tre bedaŭrinda afero. Eĉ se nur ĉar ĝi montras, ke vi tamen ne estas plene perfekta. Sed mi almenaŭ ĝojas pri unu afero: vi fakte ne tiom interesiĝis pri _via_ blondulo. Do eble vi pravas, eble li ne estas _via_ blondulo, eble vi tamen preferas vian karan brunharan amikon Tom."

"Eble, eble. Sed ĉu vi vere scias, kial mi forturnis miajn okulojn de tiu blondulo, kvankam mi antaŭe decidis plej multe informiĝi pri li?"

"Nu, verŝajne ĉar..."

"Ĉar unu el tiuj junaj soldatoj estis tiel bela viro!"

## *DEMANDOJ (16)*

Kion faris la junulo, post kiam li eliris el la vendejo?
Kien li subite eniris?
Kial Linda hezitis sekvi lin tien?
Kiel aspektis la restoracio?
Kion manĝis Linda?
Kion faris la soldatoj?
Kia estas Linda?
Kio estas Linda?
Kion rimarkas Linda post la telera milito?

### NOTOJ

Nun vi devas lerni kelkajn novajn vortojn. La unua vorto verŝajne ne estas por vi nova; ĝi estas la vorto "ESPERANTO". Se vi tion ne jam sciis, nun mi informas vin: Esperanto estas la nomo de tiu ĉi lingvo, kiun vi nun lernas.

Ne ridu tro pri tiu klarigo! En kelkaj lingvoj Esperanto ja havas alian nomon. Ekzemple, en la lingvo, kiun parolas pli da homoj ol iun alian lingvon en la mondo, Esperanton oni nomas "shi4 jie4 yu3". Ĉu vi tion jam sciis? Mi gratulas! Aŭ ĉu eble tiu granda lingvo estas via lingvo?

La aliaj vortoj, kiujn mi volas nun klarigi, estas vortoj, kiuj helpos nin paroli pri la lingvo.

Ekzistas en Esperanto kvar grandaj vortklasoj (vortospecoj):

> SUBSTANTIVOJ (o-vortoj), kiuj montras aĵojn: tablo, knabino, spegulo, libero, amo,...
>
> ADJEKTIVOJ (a-vortoj), kiuj montras ecojn: bela, juna, granda, studenta, kaŝa,...
>
> VERBOJ (kun finaĵoj "-i", "-is, "-as", "-os", "-u", "-us"), kiuj montras agojn aŭ situaciojn: esti, scii, rigardi, proksimigi, amikiĝi,...
>
> ADVERBOJ (e-vortoj), kiuj montras manierojn: tute, kompreneble, verŝajne, fakte, kaŝe,...
>
> Aliaj vortklasoj, pri kiuj ni volos paroli, estas:
>
> PREPOZICIOJ, kiuj montras rilatojn: de, al, kun, pri, da,...
>
> PRONOMOJ, kiuj resendas al substantivoj: mi, ni, vi, li, ŝi, ĝi, ili, si, oni.
>
> ARTIKOLO, kiu montras konatecon: la.

## *EKZERCOJ (16)*

Nun mi povas klarigi, kiel "kia" kaj "kiel" estas malsamaj.
Per "kia" oni demandas pri eco, do pri adjektivo (a-vorto).
Per "kiel" oni demandas pri maniero, do pri adverbo (e-vorto).

> "KIA estas via amiko?" - "Li estas belA."
> "KIEL vi manĝas?" - "Mi manĝas malrapidE."
> Ŝia vizaĝo subite iĝis ruĝa.
> "KIA ĝi iĝis?" - "Ĝi iĝis ruĝA."
> "KIEL ĝi iĝis ruĝa?" - "Subite."

Metu la ĝustan vorton!
Ĉiu mankanta vorto estas unu el: kiel, kia, kian, kiaj, kiajn.

Kun ___ sako li eliris? - Li eliris kun papera sako.
___ li forveturos? - Mi pensas, ke li forveturos aŭte.
___ numeron vi notis? - Mi notis lian aŭtan numeron.
___ vi sekvis lin? - Mi sekvis lin iom malproksime.
___ li estis vestita? - Li estis vestita per multkoloraj vestoj.
___ vi sentas vin hodiaŭ? - Mi sentas min tre bone, dankon!
___ estas via sano? - Multe pli bona ol hieraŭ.
___ virojn ŝatas Linda? - Ŝi ŝatas blondulojn.
___ vi ekkonis lin? - Ni estis en la sama lernejo.
___ restas Gerda? - Ŝi restas soifa.

# ĈAPITRO 17 (DEK SEP)

"Sed kial, kial, kial?" diris la policano preskaŭ krie al sia edzino, kiu estis lia plej helpema kunlaboranto. "Diru al mi kial, kaj mi solvos la problemon. Oni ne kaptas homon por la simpla plezuro travivi aventuron! Ŝi ne estas riĉa. Ne kun la espero ricevi monon ili ŝin kaptis. Ŝi ĉiam vivis plej trankvilan, honestan vivon. Do, ne ĉar ŝi enmiksis sin en iun kriman agadon ili ŝin kaptis. Pro kio do? Por kio?"

"Ŝi instruas, vi diris al mi. Kion do ŝi instruas? Kio estas ŝia fako?"

"Ŝi instruas historion, sed ŝi estas specialisto pri la sekretaj lingvoj de la deksepa kaj dekoka jarcentoj."

"Pro tio verŝajne ŝi malaperis, sed ni ne trovos la motivon uzante nur nian imagon. Ni prefere uzu la faktojn. Ni provu kunmeti ilin, rekunmeti la sinsekvon de la okazaĵoj. Kiel la afero komenciĝis?"

"Ni ne scias multon. Mi raportu jene. Du gestudentoj -- Tom kaj Linda -- rimarkis, ke alta blondulo metas ion en la tason de Gerda. Ili rimarkis pro lia kaŝa, ŝtela maniero agi. Iom poste, Gerda eliras el la memserva restoracio tra la pordo koridora. Tuj poste aŭdiĝas bruo, kvazaŭ iu falus. Bob, kiu aliĝis al Tom kaj Linda intertempe, eliras kune kun Tom. Ili trovas Gerdan en la koridoro: ŝi kuŝas senkonscia. Tom foriras serĉe al helpo, dum Bob gardas la junan profesorinon. Kiam Tom revenas kun la flegistino, Gerda malaperis, sed ĉi-foje Bob estas senkonscia, batita al-kape. Intertempe la blondulo eliris tra la alia pordo de la memserva restoracio, kaj sekvis Linda. Ŝi sukcesas kunveturi en lia aŭto, sed ne sukcesas igi lin diri ion helpan. Tamen ŝi notas la numeron, markon kaj tipon de la aŭto..."

"Ĉu la aŭto estis lia? Ĉu ne estis ŝtelita veturilo?"

"Ne. Verŝajne li ne suspektis, ke iu suspektos ion. Kiam ŝi petis, ke li veturigu ŝin, tio al li ne plaĉis, sed li verŝajne opiniis, ke estos eĉ pli suspekte malakcepti ŝin."

"Vi do scias, kiu li estas, ĉu ne?"

"Jes, ni kontrolis. Estas la frato de fraŭlino Marta, unu el la universitataj flegistinoj, tiu, kiun Tom venigis."

"Interese! Plej interese! La gefratoj eble kunlaboras en iu malhonesta agado. Kion ili respondas al via demandado pri tiuj strangaj okazaĵoj?"

"La flegistino nur rediras la samon, kiel Tom. Kaj la blondulon ni ankoraŭ ne pridemandis."

"Kial?"

"Por ke li ne suspektu, ke ni suspektas lin. Li estas nia sola ŝanco retrovi Gerdan. Bedaŭrinde, en la lastaj tagoj, li vivas plej normalan vivon, iris al neniu speciala loko, faris nenion atentindan. Eble li ludis sian rolon kaj ĝin finis. La aliaj -- tiuj, kiuj forkuris kun Gerda, kiam Bob, kiu gardis ŝin, estis senkonsciigita -- certe estas la gravuloj. Ili devas ekzisti, ĉar nek la alta blondulo, nek lia fratino Marta povis forporti Gerdan. Se evidentiĝos, ke la tasko de la blondulo estis nur faligi ian dormigan substancon en la trinkaĵon de Gerda, ni lin pridemandos. Ni ĝis nun esperis, ke li kondukos nin al la malaperinta belulino. Sed pli kaj pli ŝajnas, ke tio ne okazos.

## *DEMANDOJ (17)*

Pri kio parolas la policano?
Kion precize instruas Gerda?
Kiu estas la alta blondulo?
Kiu estas Marta?
Kial oni ankoraŭ ne pridemandis la blondulon?
Kiel la policano esperas retrovi Gerdan?

### NOTOJ

Jen ankoraŭ kelkaj vortoj, kiujn ni uzos por paroli pri la lingvo.

Grupon de vortoj kun verbo en la centro oni nomas FRAZO. Jen *Ekzemplo:*

Linda rigardas la blondulon.

Frazo normale havas subjekton. La SUBJEKTO estas tio, kio faras la agadon de la verbo. En tiu ĉi frazo "Linda" estas la subjekto.

Frazo ofte havas objekton. La OBJEKTO estas tio, al kio la agado de la verbo estas farata. En ĉi tiu frazo la objekto estas "la blondulon".

Oni montras la objekton aŭ per prepozicio ("Linda rigardas al la blondulo") aŭ per la finaĵo "-n". Tiun finaĵon "-n" oni nomas
AKUZATIVO. Kiel vi jam lernis, oni uzas akuzativon ne nur por montri la objekton en frazo, sed ankaŭ por aliaj aferoj.

* * *

Jam en la oka ĉapitro vi lernis pri la pronomo "si".

La pronomo "si" estas la REFLEKSIVA PRONOMO de Esperanto. Esprimoj uzantaj ĝin estas REFLEKSIVOJ.

Kiel vi jam scias, "si" resendas al la subjekto. Ekzemple:

Linda vidas sin.

signifas:

Linda vidas Lindan.

Oni devas scii, ke "si" resendas al la plej proksima subjekto. Normale tio estas la subjekto de la plej malgranda frazo (aŭ "subfrazo"), en kiu ĝi aperas. Do en la frazo:

Tom scias, ke Linda vidas sin.

"si" resendas al "Linda" (la subjekto de "vidas"), ne al "Tom" (la subjekto de "scias"). Pro tio, "si" neniam povas esti mem la subjekto aŭ parto de la

subjekto de iu verbo. Ekzemple, jena frazo estus tute neebla, se oni enmetus la vorton "sia":

Linda pensas, ke ___ opinio estas prava.

En tiu frazo "sia" devus resendi al la subjekto de "estas", kiu estas... "sia opinio". Neeble!

En ĉi tiu ĉapitro estas pli malfacila ekzerco pri refleksivoj.

## *EKZERCOJ (17)*

Nun vi scias kvar vortojn, kiuj aspektas simile: PER, POR, PRI, PRO.

PER montras ILON: Mi venis per aŭto.

POR montras CELON: Mi aĉetis kafon por vi (por trinki).

PRI montras TEMON: Mi parolis/lernis pri historio.

PRO montras KIALON: Ŝi ŝatas lin pro liaj blondaj haroj.

(CELO = tio, kion oni volas havi aŭ fari.)

Enmetu unu el tiuj vortoj en ĉiun lokon:

Mi multe lernadis ___ lingvistiko ___ sukcesi en la universitato.

___ la malfrua horo mi decidis veturi ___ aŭto, ___ esti pli rapida.

___ kio temas? - Mi ne scias; mi ĵus alvenis.

Mi dankas vin ___ via helpo.

___ la bruo en mia angulo, estis ___ mi tre malfacile aŭdi.

Mi scias certe ___ tio, ke mi vidis ĝin ___ miaj okuloj.

Ŝi venis ___ instrui kriptaĵo-sciencon, sed mi neniam aŭdis ___ tiu fako.

*Ekzemplo:*

{Tom} scias, ke {Linda} rigardas al {Tom}.

→ Li scias, ke ŝi rigardas al li.

Forigu la vortojn kun "{}"!

Marko pensas, ke {Marko} rompis {la} tason {de Marko}.

Marko pensas, ke {Tom} rompis {la} tason {de Marko}.

Tom pensas, ke {Tom} rompis {la} tason {de Marko}.

Tom pensas, ke {Tom} rompis {la} tason {de Tom}.

Tom pensas, ke {Marko} rompis {la} tason {de Tom}.

De Petro {Linda} aŭdas malveran rakonton pri {Linda}.

De Petro {Linda} aŭdas, ke Tom rakontis malveraĵon pri {Linda}.

Ivano scias, kie {Petro} kaŝis {la} tason {de Petro}, sed {Ivano} ne scias, kie {Petro} kaŝis {la} tason {de Ivano}.

{Linda} timas, ke la spiono sekvas {Lindan} tra la urbo.

{Petro} timas, ke {Linda} amas {Lindan} pli ol {Petron}.
{Linda} ĉiam pensas, ke {la} opinio {de Linda} estas prava.
Marko diras, ke {Petro} perdis {la} tason {de Marko}.
Sed Petro diras, ke {Marko} perdis {la} tason {de Marko}.
Linda ne scias, ke {Marko} {Lindan} amas.
Linda ne scias, ke {Marko} {Gerdan} amas.

# ĈAPITRO 18 (DEK OK)

"Via situacio ne plaĉas al vi, ĉu? Vi dezirus ŝanĝi ĝin, ĉu ne? Nu, estas facile ŝanĝi vian situacion.

"Vi ŝatus manĝi ion, ĉu ne? Pecon da pano vi deziras, tute certe. Aŭ ĉu frukton? Jen, rigardu, mi havas pomon kaj oranĝon por vi. Kiel belaj ili estas! Plenaj je suko, evidente. Se vi estus konsentinta labori por ni, vi jam estus plene sata. Kaj jen io alia: kuko. Ĉu ne bonega, belega, manĝinda kuko? Ankoraŭ varma, ĵus bakita. Tuŝu, sentu mem, kiel plaĉe varmeta ĝi estas. Vi malsatas nur pro via stulteco. Se vi estus saĝa, vi konsentus fari la etan laboron, kiun mi petas de vi, kaj vi tuj ricevus la manĝaĵojn. Mi bedaŭras, ke vi estas tiel obstina. Estas bedaŭrinde, vidi tiel bela knabino suferi pro malsato. Mi sincere bedaŭras vian obstinecon. Nur eta "jes", kaj ĉio ĉi estos via."

Li ŝajnigas sin afabla, sed estas io tre aĉa en lia vizaĝa esprimo. Gerda sentas sin pli kaj pli malforta. Estas varme en ĉi tiu ĉambraĉo, kio ne estas facile elportebla. Krome, ŝi malsatas, kaj la vido de tiu pomo kaj de tiu oranĝo estas vere suferiga. Kaj tamen ŝia devo estas diri "ne".

"Ĉu vi legis la dokumenton, ĉu vi komprenis ĝin?" li aldonas, kvazaŭ espere.

Kompreneble ŝi legis: ŝi estis scivola. Almenaŭ ŝi bezonis scii, kial oni ŝin kaptis kaj senigis je libereco. Tial ŝi legis. Estis malfacile kompreni, komence, sed iom post iom ŝia memoro plene revenis, ŝi rememoris la principojn de tiu sekreta lingvo, kaj ŝi sukcesis kompreni ĉion; ŝi havis nenion alian por fari. Dum multaj horoj ŝi estis sola kun tiu dokumento, kiun ili lasis al ŝi. Sed ŝi decidis neniam respondi al ili; ŝi ja antaŭ longe promesis al Profesoro Kosadi, ke pri tio ŝi ĉiam silentos. Neniam ŝi ŝanĝos sian decidon.

"Ĉu vi legis la dokumenton?" sonas duan fojon la aĉa voĉo.

Ŝi plu silentas, kaj li eliras, furioza. Li eliras kun la pano, la pomo, la oranĝo kaj la kuko. Feliĉe, ke almenaŭ ili lasis al ŝi akvon, varmaĉan akvon, jes ja, apenaŭ trinkeblan, certe, preskaŭ ne sensoifigan, prave, sed tamen akvo. Malsaton eblas pli malpli elporti, sed soifon ne.

Minutoj pasas. Multaj minutoj. Unu horo, du horoj, ĉu tri horoj? Ĉu multaj horoj? Kiel scii? Ne estas horloĝo sur la muro, kaj ili prenis ŝian brakhorloĝon. La lumo apenaŭ ŝanĝiĝas en la ĉambro, pro la nemoveblaj fenestro-kovriloj. Ĉu estas frue, ĉu estas malfrue, ŝi tute ne povas scii. Tago, nokto, mateno, vespero ĉi tie estas samaj. Sunlumo neniam envenas.

Kaj jen la aĉulo revenas, kun radio-kaj-kased-aparato. Li enmetas kasedon, kaj irigas la aparaton. Eta, plenda plorema voĉeto aŭdiĝas, kaj ŝiras la koron de Gerda:

"Patrino, patrineto mia, mi petegas vin. Faru, kion ili volas. Ili kaptis min. Mi ne scias, kie mi estas. Estas terure. Mi timas. Mi tiom deziras reiri hejmen. Mi petegas vin, faru tion, kion ili deziras. Se ne, ili faros malbonon al mi. Ili ne diris, kion. Ili ne volas diri. Sed mi scias, mi sentas, ke estos terure. Kompatu min, kara, kara patrino. Kompatu vian filinon. Mi timegas.

Rapidu, rapidu, ke plej frue ili liberigu min. Ili ne volas, ke mi parolu pli longe, sed mi havas paperon kaj plumon, kaj mi tuj skribos leteron al vi. Mi nur petegas: obeu ilin!"

"Jen la letero," li kriaĉas, kaj post ridaĉo li aldonas:

"Nu, tio verŝajne sufiĉos. Mi revenos post iom da tempo. Mi estas certa, ke vi iĝos saĝa, finfine. Kaj jen. Prenu ĉi tion, ĝi helpos vin pensadi." Kaj tion dirante, li ĵetas al ŝi belegan pomon. Gerda sentas sin, kvazaŭ Eva ĉe l' serpento.

## *DEMANDOJ (18)*

Kiu parolas komence de la ĉapitro, kaj pri kio?

Kiel sentas sin Gerda?

Kiom facile ŝi legis la dokumenton?

Kial ŝi ne diras, kio estas skribita en la dokumento?

Kion kunportas la aĉulo, kiam li revenas, kaj kial?

Kia estas la voĉo de la filino de Gerda?

Kion Gerda ricevas por manĝi?

### NOTOJ

Ĉu vi scias, kion signifas "signifas"? Se ne, jen klarigo:

"SIGNIFI" estas "doni ideon", "esti komprenata en certa maniero".

"SIGNIFO" estas la ideo donata aŭ komunikata. Oni povas paroli pri la signifo de vorto ("Perdi" signifas "ekmalhavi", ekzemple) aŭ de io alia (Ruĝa lumo povas signifi "Haltu!").

Por la sekvanta ekzerco vi devos parigi la vortojn kaj la signifojn. "Centro" kaj "mezo" estas bona paro, ĉar "centro" signifas mezon (neprecize, sed preskaŭ).

## *EKZERCOJ (18)*

*Ekzemplo:*

centro :

---> centro : mezo

Trovu la vortojn!

ama(n)to aŭ ŝata(n)to :

ameti :

centro :

en kiu loko :

enakvigi :

esprimi feliĉon pro io ricevita :

esti atenta, sin okupi :

farebla sen granda laboro :

fari tre malbone :

grupo de amikoj (ekzemple) :

grupo de lernantoj :

io kutime farata :

kun bone funkcianta korpo :

mallasta :

ne kun :

ne paroli, fari nenian bruon :

neĉiutaga okazaĵaro :

ofta okulkoloro de blonduloj :

parto de parolo :

perdi la konscion :

pro kio :

rigardi kiel veran :

risko de malbono :

senti la suferojn de alia homo :

sesdek sekundoj :

tempo en historio :

tia, ke oni devas tuj fari ĝin :

tre tre :

vidilo en kapo:

viro aŭ virino :

La vortoj estas:
*amiko, aventuro, bani, bluo, danĝero, danki, ege, epoko, facila,*
*fuŝi, homo, kial, kie, klaso, kompati, kredi, mezo, minuto, okulo, rondo, sana, sen, silenti, sveni, ŝati, tradicio, unua, urĝa, vorto, zorgi.*

# ĈAPITRO 19 (DEK NAŬ)

Petro: Eble ni forkuris tro rapide. Ĉu vere fantomoj ekzistas?

Ralf: Ĉu vi volas raporti pri la voĉo al viaj gepatroj? Se jes, vi ne plu estas mia amiko. Se ili scios, ke ni ludis en la malpermesita domaĉo, vi...

Petro: Ne. Mi tute ne volas diri al la gepatroj, ke ni ludis tie. Tio estas nia sekreto. Mi nur v...

Ralf: Jes. Sekreto kunigas la amikojn. Se vi gardos la sekreton, vi restos mia amiko. Sed se vi malkaŝos ĝin al granduloj, mi... mi... mi suferigos vin, mi igos vin plori tiel grave, ke neniam plu en via tuta vivo vi forgesos tiun tagon. Kredu min, en via tuta vivo, tio estos la lasta fojo, kiam vi rompis promeson. Kio? Ĉu tio igas vin ridi?

Petro: Mi ne ridas, mi nur v...

Ralf: Ankaŭ mi ne ridas. Mi parolas plej serioze. Oni ne ridas pri veraj danĝeroj, ĉu? Kaj se vi...

Petro: Sed mi tute ne volas diri ion al la gepatroj. Mi nur...

Ralf: Kaj se vi rakontos ĝin en la lernejo, ne estos pli bone por vi. Mi plorigos vin tute same. Mi malpurigos viajn vestojn, kaj via patrino krios furioze kiam vi revenos hejmen. Mi kuŝigos vin en akvo kaj sidos sur via kapo. Mi kaptos vin per mia speciala kaptilo kaj veturigos vin en la montaron kaj forlasos vin tie, kaj vi estos tute sola kaj perdita, kaj vi ploros. Vi...

Petro: Vi eĉ ne scias ŝofori. Mi ne kredas je via kaptilo. Kaj cetere, mi nur...

Ralf: Jes, mi scias ŝofori.

Petro: Vi ne rajtas ŝofori ĉar vi estas tro juna. Kaj vi ne havas aŭton.

Ralf: Mi ne zorgas pri tio, ĉu mi rajtas aŭ ne. Se mi farus nur tion, kion mi rajtas fari, mi farus nenion. Mi ŝtelos iun veturilon, jes, mi ŝtelos veturilon de iu instruisto en la lernejo kaj veturigos vin sur monton kaj lasos vin tie kaj vi ploros. Se vi parolos al iu el niaj samklasanoj aŭ samlernejanoj, la tuta lernejo ekscios pri la virino el la malnova domaĉo, kaj poste la gepatroj...

Petro: Vi diris "virino", do vi ne kredas, ke estas fantomo. Vi do konsentas, ke...

Ralf: Kompreneble mi ne kredas je fantomoj. La virino, kiun ni aŭdis, estas virino, kiun mi kaptis kaj gardas tie. Mi planas igi ŝin mia servistino: ŝi faros ĉion, kion mi volos. Kaj se vi parolos pri ŝi... Nu, mi ne volas paroli pri tio, kio okazos al vi, ĉar vi tro timus...

## *DEMANDOJ (19)*

Kiuj estas Petro kaj Ralf?
Kial Ralf provas timigi Petron?
Kiamaniere li provas timigi lin?
Ĉu Petro estas timigita?
Kion Ralf rakontas pri la virino?

## *EKZERCOJ (19)*

*Ekzemplo:*
speco de agado :
→ speco de agado : maniero
Trovu la vortojn!
afero, io pripensebla :
agi farante sian taskon, servon, oficon :
bona sento de komforteco aŭ ĝojo :
de tiu speco :
deziranta nenion alian ol tio, kion oni havas :
ekhavi :
ekmalfunkcii :
en bezonata kiomo :
enpreni akvon :
esprimi doloran senton per neparolaj sonoj :
facile uzebla, bona por la celo :
fari tre malplaĉan senton :
granda en la direkto nek de longo nek de diko :
ĝusta aranĝo aŭ dismetado :
havigi al si interŝanĝe por mono :
iri, sed ne paŝante :
je ĉiu tempo :
konsenti ricevi ion :
kontraŭkrima administraĵo :
kunmeti tiel, ke oni ne povas facile rekoni la partojn :
malesti, foresti, ne esti sufiĉe multe :
malfaciligi aŭ malhelpi ies movojn, maloportuni al iu :

meti en situacion aŭ pozicion, kiu malebligas eniron aŭ eliron :
ne daŭrigi :
ordigi, prizorgi :
plaĉa per ĝentileco, amikeco :
povanta bone kaj ĝuste decidi :
preni kun si, havi kun si :
pro dubo halti ne sciante, kion fari :
proksime al :
pura, travidebla, komprenebla :
rebonigi, refunkciigi :
rediri, refari :
senakva aŭ kun malmulte da akvo :
senti bezonon trinki :
senti strangecon, neatenditecon, nekutimecon :
senviviĝi :
sidilo :
speco de agado :
ujo por trinkaĵo :

La vortoj estas:
*aĉeti, afabla, akcepti, apud, aranĝi, ĉiam, dolori, fermi, fini, funkcii, glaso, ĝemi, ĝeni, heziti, klara, kontenta, larĝa, maniero, manki, miksi, miri, morti, objekto, oportuna, ordo, panei, plezuro, polico, porti, ricevi, ripari, ripeti, saĝa, seĝo, seka, soifi, sufiĉa, tia, trinki, veturi.*

# ĈAPITRO 20 (DUDEK)

Paŝoj. Oni paŝas sur la strato. Gerda aŭskultas atente; ŝi antaŭsentas, ke io grava baldaŭ okazos. Bruo de multaj homoj. Ili venas. Ili ŝajnas multaj, laŭ la bruo: ĉu nun oni venos grupe por ŝin suferigi? Ŝlosiloj. Bruo de ŝlosiloj trans la pordo. Iu enmetas ŝlosilon en la seruron. Ŝi scias, ke ne estas ŝia kutima vizitanto. Li ne agas tiel. Li enmetas tre rapide la ŝlosilon, ĝin turnas, eniras. Ne ĉi tiu. Li provas unu fojon. Ne sukcesas. Plia bruo de ŝlosiloj. Alian fojon li provas, sen pli da sukceso. Li provas ree kaj ree per diversaj ŝlosiloj. Aŭdeblas, ke li ne konas la seruron. Kiam li enmetis ŝlosilon, li tenas ĝin laŭ diversaj direktoj, kvazaŭ li ludus per ĝi, verŝajne ĉar li esploras nekonatan seruron.

Kaj jen li fine sukcesas! Li eniras.

"Polico!" li diras, kaj Gerda devas superi fortan emon salti al li por lin kisi. Estas alta viro, maldika, kun nigraj haroj kaj verdaj okuloj, kiu sin tenas tre digne.

Post li venas aliaj homoj, multe pli junaj. Ŝi jam vidis tiujn vizaĝojn. Studentoj ili estas. Ilia sinteno estas tute malsama: senstreĉa.

"Tiuj gejunuloj multe helpis min," la policano klarigas. "Ni ne estas sufiĉe multaj en la polico por ĉion fari, kaj ilia helpo estis tre bonvena." Kaj li prezentas ilin: Tom, Bob, Linda. Kiam ŝi aŭdis la paŝojn, Gerda imagis, ke venas sep, ok, eble naŭ homoj, sed almenaŭ ses; fakte, ili estas nur kvar.

"Mia filino...?" ŝi demandas, kaj ŝi apenaŭ povas eligi la du vortojn, tiom ŝi timas la respondon.

"Savita: ŝi nun estas en via hejmo, kun via edzo. Viaj kaptintoj estas amatoroj, kiuj agis fuŝe. La etulino estis ĉe la onklino de tiu f-ino (=fraŭlino) Marta, la universitata flegistino. Ni facile trovis ŝin. Ŝi tre ĝojis revidi la patron, kaj la hejmon, kompreneble."

"Ho, mi dankas, mi dankegas vin. Via diro ŝanĝas mian tutan vivon. Sed diru: kiel vi alvenis ĉi tien? Kiel vi malkovris, ke ili tenas min enŝlosita en ĉi tiu domaĉo?"

"Du knaboj rakontis pri voĉo en ĉi tiu malnova, forlasita domo. Dank'al ili... Sed nun rakontu _vi_. Kion viaj kaptintoj celas? Kio estas ilia celo? Kial vin teni mallibera?"

"Ili volas, ke mi traduku malnovan dokumenton. Mi malkonsentis. Tiam ili opiniis, ke perforte ili sukcesos. Ili preskaŭ sukcesis. Per malsato, unue, kaj poste per la mesaĝo de mia filino. La malsato ne estis facile elportebla, kredu

min, sed la mesaĝo sur-kaseda...! Fakte mi terure malsatas nun. Mi petas, ĉu iu el vi bonvolus iri aĉeti manĝaĵon por mi? Io ajn estos bonvena."

Linda foriras por aĉeti manĝaĵojn.

"Vi rakontos al mi, ĉion, senmanke," ŝi diras al la du knaboj elirante.

Gerda raportas pri la dokumento; ŝi tenas ĝin enmane kaj tradukas, vorton post vorto; krome, ŝi donas ĉiujn necesajn klarigojn.

La policano kapjesas komprene. Gerda klarigas al li ankoraŭ pli pri la kondiĉoj de sia mallibereco. Kaj jen la policano havas ideon.

"Bob, ĉu vi konsentus kaŝi vin sub la lito, se iu envenus?"

"Kial?"

"Mi havas planon. Mi ŝatus, ke ni ĉiuj foriru, krom vi kaj Gerda, kaj ke ŝi diru al la kaptinto, ke ŝi konsentas klarigi al li, kio estas skribita sur tiu papero, mi volas diri: sur tiu malnova dokumento. Ili tiam agos laŭ la dokumento, kaj ni kaptos ilin tiom pli facile. Sed tamen, ni ne rajtas riski, ke Gerda suferu. Kiu scias? Kiam ŝi ne plu estos necesa por ili, ili povus... Nu, vi komprenas. Vi restos ĉi tie, kaj kiam vi aŭdos paŝojn proksimiĝi, vi kaŝos vin sub la lito, kaj bone atentos ĉion, kio okazas. Gerda diris, ke ĉiam venas nur unu persono, unu viro, maldika ulo, ne tre forta. Fortulo kiel vi tuj superos lin, se necese."

Bob konsentas, kvankam, se diri la veron, kun iom duba esprimo.

## *DEMANDOJ (20)*

Kion aŭdas Gerda?
Kiel ŝi scias, ke ne estas la kutima vizitanto?
Kiujn prezentas la policano al Gerda?
Pri kio estas la unua demando de Gerda?
Kiel la kaptintoj celis igi Gerdan kunlabori?
Por kio foriras Linda?
Kial la policano petas, ke Bob restu kun Gerda?

## *EKZERCOJ (20)*

*Ekzemplo:*
senti vivan plezuron :
→ senti vivan plezuron : ĝoji
Trovu la vortojn!
afabla en kutima kaj ĝusta maniero :
aro de lokoj trairataj por iri de unu loko al alia :
dolore senti perdon, esti malkontenta pro ia faro aŭ manko :
ekkonscii pri :
ekmaldormigi :
emi ion fari pro ofta ripetado :
en iu loko :
en neniu loko :
esprimi malkontentecon :
esti aŭdebla :
faradi pro plezuro :
fari la unuan parton de io :
fari muzikon pervoĉe :
fari voĉbruon por montri subitan ĝojon :
fermi per seruro :
forte aŭdebla :

grupo de homoj kun samaj tradicio kaj historio :
havi permeson fari ion :
havi samajn ecojn kiel :
homido :
homo konsiderata kiel konscia kun devoj kaj rajtoj :
iri per egalaj paŝoj :
je iu tempo :
kapabla iri kaj fari laŭplaĉe :
klara, certa, perfekte ĝusta :
kredi, ke iu dezirata realiĝos :
meblo por kuŝado kaj dormado :
meti ion sur :
montri doloron per okulakvo kaj ĝemetoj :
natura altegaĵo :
ne kapabla bone pensi :
ne miksita, sen nedezirata aldono :
okupi la atenton de iu :
parolsono de homo :
parto de homa korpo, ĉe kies fino estas mano :
parto de muro, kie povas enveni lumo kaj aero :
perdi memoron pri :
pervoĉe fari laŭtajn sonojn :
pluestadi, ne esti finita :
prezenti ideon pri io farinda :
rapide iri piede :
rilati, interesi, esti la temo de :
sciigi okazintaĵojn per vortoj :
senmanka :
sentanta eluzitecon de siaj fortoj :
senti vivan plezuron :
sentigi emon fali (moviĝi malsupren) :
sesdek minutoj :
ŝtonego :
trankvila kaj sentima antaŭ danĝero :
translokigi :
re mallonga tempodaŭro :
uto da kondiĉoj kaj ĉirkaŭaĵo :

tute kontenta, bonŝanca :
vira naskiginto de ido :

La vortoj estas:
*bedaŭri, brako, daŭri, esperi, feliĉa, fenestro, forgesi, ĝentila, ĝoji, horo, ie, iam, infano, interesi, kanti, komenci, koncerni,kovri, krii, kuri, kuraĝa, kutimi, laca, laŭta, libera, lito, ludi, marŝi, momento, monto, movi, nacio, nenie, patro, perfekta, persono, pezi, plendi, plori, preciza, proponi, pura, rajti, rakonti, ridi, rimarki, roko, simili, situacio, soni, stulta, ŝlosi, veki, voĉo, vojo.*

# ĈAPITRO 21 (DUDEK UNU)

Gerda sentas sin pli bone. Ŝi ĵus finis manĝi. Foriris Linda, Tom kaj la policano. Ŝi parolas kun Bob, tre mallaŭte. Ili ja devas atenti, ĉu iu proksimiĝas aŭ ne. Feliĉe, eĉ sen speciale aŭskulti, ŝi ĉiam bone aŭdis, sufiĉe frue, kiam la aĉulo venas. Bob plaĉas al ŝi. Li estas granda kaj forta, kun esprimo de bonkora, sindonema hundo.

Ili parolas pri siaj vivoj, pri la lastaj okazaĵoj. Kiam ŝi parolas pri sia edzo, lia vizaĝo ŝanĝiĝas, alprenas iom malĝojan esprimon. Ĉu li enamiĝus al ŝi?

Kaj jen aŭdiĝas paŝoj. Bob saltas sub la liton, provas rapide trovi ne tro malkomfortan pozicion sub la lito. "Ne brui," li diras al si, "plej grave, plej necese estas ne brui!"

Envenas la gardanto, la aĉa malgrasulo, kiu, per siaj vortoj pri manĝo, tiom suferigis Gerdan. Sed ĉi-foje ŝi povos kontentigi lin. Kia plezuro!

"Mi konsentas," krias Gerda, kiam la maldika aĉulo malfermas la pordon. "Mi akceptas vian proponon. Mi ne plu elportas. Mi tradukos vian aĉan paperon. Liberigu mian filinon, kaj donu al mi manĝi, mi petas."

"Jen," simple diras la maldikuleto, kaj li elprenas el sako panon, kolbason, kukon, fruktojn, ĉokoladon, kaj eĉ botelon da lakto. Gerda manĝas silente; ŝi povus manĝi eĉ pli, kvankam ŝi ĵus iom manĝis. Bob, aŭdante la manĝobruon, pli kaj pli malsatas, sed kion li povus fari?

"Nu, bonvolu klarigi al mi, kio estas skribita sur tiu malnova papero," la vizitanto diras.

Kaj Gerda klarigas. Ŝi rakontas, ke temas pri la trezoro de la Lumoserĉantoj. La Lumoserĉantoj estis sekreta societo, kiu naskiĝis en la dekkvina jarcento kaj daŭris, jen forta, jen malforta, laŭ la epokoj, ĝis la mezo de la dekoka jarcento. Ĝi havis membrojn en tre multaj landoj, en popoloj plej malsamaj. Katolikoj, protestantoj, ortodoksuloj, judoj, islamanoj, budhanoj kaj aliaj estis membroj de tiu internacia aŭ supernacia societo. Ilia celo estis sekrete labori por la unuigo de la mondo, de la popoloj, por la harmoniigo de la religioj, kaj por ke la malsamaj tradicioj interkompreniĝu. Ili estis morala kaj filozofia elito. Ili estis elpensintaj sekretan lingvon, kiu ebligis al ili komuniki, el kiu ajn lando aŭ popolo ili estis. La ŝtatoj, kiam ili malkovris la ekziston de la Lumoserĉantoj, ektimis tiujn homojn, miskomprenis iliajn celojn, kaj ilin persekutis. Inter la Lumoserĉantoj, tre riĉaj homoj troviĝis. Tial, laŭ diversaj malnovaj dokumentoj, ilia trezoro estas multvalora. Tiu ĉi papero estas fotokopio de dokumento, kiu tre precize indikas, kie oni kaŝis la trezoron.

Gerda klarigas, tradukas, kaj la viro notas ĉiun detalon sur etan notlibron. Kiam ŝi finis, li diras:

"Dankon. Nun ni havas, kion ni deziris. Mi foriras. Mi lasas vin tie ĉi. Ni decidos poste, kion ni faros el vi. Adiaŭ, belulino, adiaŭ."

Nur post kiam la pordo fermiĝis kaj la bruo de la paŝoj forsvenis, aŭdiĝas de sub la lito voĉo, kiu diras:

"Ĉu vi lasis al mi iom de tiu kuko?"

## *DEMANDOJ (21)*

Pri kio parolas Gerda kaj Bob?
Kio okazas post iom da tempo?
Kion promesas Gerda?
Pri kio temas la papero?
Kiuj estas la Lumoserĉantoj?
Kial la ŝtatoj persekutis ilin?
Kiam la aĉulo foriras?

## *EKZERCOJ (21)*

*Ekzemplo:*
kunligita aro :
→ kunligita aro : grupo
Trovu la vortojn!
administrejo por transportado de leteroj :
agrable sentiganta, kiel sukero :
ano de la militistaro :
antaŭe pripensita kaj ordigita aranĝo de realigota agado :
aro de aĵoj kun samaj ecoj :
arto aranĝi sonojn en maniero plaĉa por aŭskultado :
ĉe la flanko kontraŭa al tiu de la koro :
ĉiu el la okazoj, kiam io okazas :
dekstra aŭ maldekstra parto :
ebleco de sukceso :
elstara parto meze de vizaĝo :
estiĝi, fariĝi en iu loko aŭ momento :
farota laboro aŭ servo :
fordoni ion interŝanĝi por mono, malaĉeti :
frua parto de tago antaŭ tagmezo :
granda movebla objekto por uzado en domo :
ĝentile esprimi al iu sian kontentecon pro ties sukceso aŭ feliĉo :
io plata, el kio oni manĝas :
je la tago antaŭ la nuna tago :
korpaj ludoj :

kovri la korpon per io portebla :
kunligita aro :
malalta aŭ maldika :
maldika aĵo, sur kiu oni skribas, kaj el kiu oni faras librojn :
mallonga memoriga skribaĵo :
mallonge antaŭe :
manĝaĵo kun multe da akvo :
okazanta pli antaŭe, proksime al la komencotempo :
pansimila sed pli dolĉa bakaĵo :
perforte dispecigi :
reciproka mortigado inter malamikaj homgrupoj :
restoracia servisto, kiu alportas la trinkaĵojn kaj manĝaĵojn :
ruĝeco, blueco, bruneco, verdeco, nigreco, ktp :
ruĝete terkolora :
sciigi al alia persono, kion oni aŭdis, vidis kaj trovis :
sin movi tra la aero :
speco de simpla manĝaĵo :
supra kovrilo de ĉambro :
vere ekzistanta kaj kontrolebla :
vojo inter domoj en urbo :

La vortoj estas:
*bruna, dekstra, dolĉa, flanko, fojo, flugi, frua, gratuli, grupo, hieraŭ, ĵus, kelnero, koloro, kuko, mateno, meblo, milito, muziko, nazo, noto, okazi, pano, papero, plafono, plano, plata, poŝto, raporti, reala, rompi, soldato, speco, sporto, strato, supo, ŝanco, tasko, telero, vendi, vesti.*

# ĈAPITRO 22 (DUDEK DU)

Baldaŭ venis la policanoj, por ilin liberigi. Gerda reiris hejmen, al siaj filino kaj edzo. Sed Bob rapidis al la flughaveno. Li volis ĉeesti kun Linda kaj Tom, kiam la policano arestos la kaptintojn de Gerda.

Estis sufiĉe multekosta vojaĝo, sed la familio de Gerda -- riĉa familio -- pagis por ili la bileton, tiel esprimante sian dankemon.

Ĉar la policano kaj la gejunuloj sciis pli frue ol la ŝtelistoj, kie troviĝas la trezoro, ili havis multe da tempo por prepari sin. Ili ne dubis, ke la aliaj venos kiel eble plej baldaŭ, kaj ke la tuta bando venos. Kutime tiaj homoj ne fidas sin reciproke, kaj volas kune ĉeesti por certiĝi, ke neniu kaŝos por si parton de la trovaĵo.

La loko indikita troviĝis ĉe la piedo de monto, en kaverno, kie, videble, neniu paŝis jam de jaroj.

"Feliĉe, ke ili ne kaŝis tiun trezoron trans la maro, ekzemple sur insulo, kien nur per ŝipo oni povas iri. Se estis vere internacia societo, kiel Gerda diris, tio estis ebla, ĉu ne?" Tiel parolis Linda.

"Vi pravas," diris Tom. "Mi tute ne ŝatus vojaĝi ŝipe. La maro ĉiam igas min malsana. Mi ŝatas rigardi la maron, resti ĉe la maro, libertempi apud la maro, sed ne vojaĝi per ŝipo sur ĝi: ŝipoj konstante dancas sur la maro, kaj ilia danco tute ne plaĉas al mi. Feliĉe, ke hodiaŭ oni povas iri preskaŭ ien ajn aviadile. Aviadiloj preskaŭ tute ne dancas. Sed eĉ aviadiloj nur duone plaĉas al mi. Plej multe mi preferas, kiam mi veturas sur tero, sur bona firma tero. Mi bezonas sub mi ion pli firman ol akvo kaj aero. Plej plaĉe estas promeni piede sur bona tera vojo. Mi..."

Sed Linda interrompis lian paroladon, iom strangan en tiuj kondiĉoj, en kiuj ili troviĝis:

"Kiam alvenos la trezor-serĉantoj, laŭ via opinio?" ŝi demandis la policanon.

"Morgaŭ, tute certe. Ili ne povus alveni hodiaŭ, ĉar ne plu estis aviadilo post la nia, kaj aŭte ili bezonus la tutan nokton. Verŝajne Bob flugos en la sama aviadilo."

La temperaturo estis plaĉa, kaj bela la vetero. Ili starigis sian tendon en la proksimeco, tamen bone prizorgante, ke ĝi ne estu videbla por alvenantoj. La sola maniero, laŭ kiu la trezorserĉantoj povus alveni antaŭ la morgaŭa tago, estus, ke ili flugu per malgranda aviadilo, speciale luita. Sed lui specialan aviadilon kostas tiel multe, ke plej verŝajne ili ne uzos tiun rimedon.

La sekvantan matenon, niaj amikoj vekiĝis frue. Tuj la policano kaj la gestudentoj aranĝis, ke ĉiu el ili, unu post la alia, gardostaros en loko, de kie

eblas facile observi la solan vojon -- aŭ pli ĝuste vojaĉon -- laŭ kiu oni povas proksimiĝi al la kaverno, kaj ke ĉiu havos en la kaverno sian difinitan kaŝejon.
Post tri horoj da atendado, io fine okazis. Linda, kiu gardostaris en la iom alta observejo, faris la deciditan signalon, kaj rapide kuris de supre al siaj kunuloj.

"Aŭto alvenas!" ŝi kriis.
En tiu ege soleca regiono, kiu povus veni aŭte per tiu tera vojaĉo, se ne la trezorserĉantoj? La tri atendantoj sin kaŝis, ĉiu en sia difinita loko, malantaŭ rokoj, da kiuj oportune troviĝis multe en la kaverno.

## *DEMANDOJ (22)*

Kie troviĝas la loko indikita?
Kial Tom tute ne ŝatus vojaĝi ŝipe?
Kiel oni povas iri preskaŭ ĉien ajn?
Kiom da homoj atendas la trezorserĉantojn?
Kion rimarkas Linda observante la vojon?

## *EKZERCOJ (22)*

*Ekzemplo:*
ekpreni kaj firme teni :
→ ekpreni kaj firme teni : kapti
Trovu la vortojn!
aliigi :
aparato por montri la horojn :
atenti, zorgi kontraŭ danĝero aŭ ebla malbono, teni :
certigi, ke oni ion faros :
detale esplori, ĉu io estas ĝusta aŭ ĝuste farita :
domo aŭ loko, kie oni konstante vivas :
ekpreni kaj firme teni :
ekzemplo prezentanta iun specon :
estanta post ĉiuj aliaj :
firme restanta ĉe siaj opinio kaj volo :
grava skribaĵo :
irigi kun si :
kapti por teni, porti aŭ uzi; havigi al si; akcepti, ricevi :
kaŝe forpreni ion de alia homo :
kontentigi, feliĉigi, ĝojigi :
kun multe da havaĵo, da mono, da io ajn :
kunaĵo de objektoj kaj iloj servanta por ion fari :
ne bezonanta manĝaĵon :
ne kontraŭstari, vivi kun io ĝisfine :
ne tute, sed ne tute ne :
pagilo konsistanta el pecoj kun difinitaj valoroj :
preni kiel rimedon, agi per io por kontentigi bezonon :

provadi por trovi :
rapide forigi de si tra la aero :
scienco pri pasintaj okazaĵoj; rakonto pri okazintaĵo :
sekvi per okuloj kaj kompreni ion skribitan :
sekvi tion, kion volas alia persono :
senti doloron, travivi malfeliĉaĵon :
sin vidigi, ekmontriĝi, iĝi videbla :
skribaĵo sendita al alia homo :
solvota demando, malfacilaĵo :
suferi pro manko de iu necesa, necesigi ion :
surpaperigi vortojn :
timego :
tio, kio igas iun agi aŭ opinii en iu maniero :
trairi, preteriri; transirante malaperi, ne daŭri :
trovi la respondon al demando, la rimedon kontraŭ malfacilaĵo :
vira ido de samaj gepatroj :
vira homido :
viro ligita al virino por kunvivado kaj nasko de infanoj :

La vortoj estas:
*aparato, aperi, bezoni, dokumento, edzo, elporti, filo, frato, gardi, hejmo, historio, horloĝo, ĵeti, kapti, konduki, kontroli, lasta, legi, letero, mono, motivo, obei, obstina, pasi, plaĉi, preni, preskaŭ, problemo, promesi, riĉa, sata, serĉi, skribi, solvi, suferi, ŝanĝi, ŝteli, teruro, tipo, uzi.*

# ĈAPITRO 23 (DUDEK TRI)

Post duonhoro, iu envenis. Estis Bob!

"Kie sin kaŝas la Lumserĉantoj?" li kriis, "ĉu en la mallumo?"

La aliaj sin montris.

"Rekaŝu vin, ili tuj alvenos," li diris.

"Kiel vi faris por antaŭi ilin?"

"Dank'al Gerda: ŝi telefone aranĝis, ke veturilo atendu min ĉe la flughaveno, kaj ke ŝoforo min veturigu ĉi tien. Mono solvas multajn problemojn, kaj ŝi estas riĉa, kiel vi scias; ŝi donis tre precizajn

indikojn por ebligi al la ŝoforo trovi la lokon, kaj jen mi estas. Sed niaj trezorserĉantoj tuj alvenos. Ili flugis en la sama aviadilo, kiel mi, kaj kiam la ŝoforo min trovis, mi vidis ilin iri al oficejo, kie oni luas aŭtojn."

Tom kuris supren al la observejo. Post kelkaj minutoj, la aliaj aŭdis lian signalon.

Envenis la kavernon flegistino Marta, ŝia frato la alta blondulo, la malgrasulo, kiu rilatis kun Gerda, kiam ŝi estis mallibera, kaj du aliaj viroj.

"Profesoro Ronga!" mire diris al si la tri gestudentoj, kaj tuj poste ili aldonis: "Kaj Profesoro Fergus!"

La unua instruis lingvistikon, la dua anglan literaturon.

Laŭ la malnova dokumento, la trezoro troviĝis en kofro metita en kavo aranĝita en la rokoj, kaj la ŝtonoj, kiuj ĝin kovris kaj kaŝis, kuŝis laŭ preciza desegno. Fakte, la ĝusta loko estis indikita per signoj tiel multaj, kvankam diskretaj, ke la pasado de l' jarcentoj ne povu forpreni ĉiujn. Pro tiuj precizaj indikoj, la ĝusta loko iĝis rapide trovita. La grupo forprenis la kaŝantajn ŝtonojn. Montriĝis, ke la kavo estis plenigita per korko kaj diversaj aliaj substancoj, kies celo verŝajne estis protekti la kofron kontraŭ malsekeco.

La kofro, kiun ili eltiris, ne estis tre granda, nek speciale bela aŭ valora. Ĝi estis ŝlosita. Per siaj iloj, ili ĝin malfermis.

## *DEMANDOJ (23)*

Kiel Bob sukcesis antaŭi la bandon?
Kiom da trezorserĉantoj envenis la kavernon?
Kio mirigas la tri studentojn?
Kie, laŭ la malnova dokumento, troviĝas la trezoro?

## NOTOJ

En ĉapitro 9 vi lernis pri la finaĵo "-it-". (La kapo de Bob estis "batita".) En ĉapitro 11 vi lernis pri la finaĵo "-ant-". (Linda pensas, sin "demandante", ĉu...) Poste, en ĉapitro 14, aperas la finaĵoj "-at-" kaj "-int-". (Ĉambro "nekonata". Kvazaŭ ŝi estus "laborinta".)

La vortoj kun "-ant-" kaj "-at-" rilatas al la nuno, al la estanteco (al tio, kio okazas aŭ estas nun). La vortoj kun "-int-" kaj "-it-" rilatas al la estinteco (al tio, kio okazis aŭ estis antaŭe).

Ekzistas ankaŭ finaĵoj "-ont-" kaj "-ot-" por la estonteco (tio, kio okazos aŭ estos poste). Vortoj kun la finaĵoj "-ant-", "-at-", "-int-", "-it-", "-ont-", "-ot-" estas nomataj PARTICIPOJ, kaj tiuj finaĵoj estas la PARTICIPAJ FINAĴOJ.

La participoj kun "-nt-" estas la SUBJEKTAJ PARTICIPOJ; ili rilatas al la subjekto de la participigita verbo. Oni nomas ilin ankaŭ AKTIVAJ PARTICIPOJ.

La participoj kun nur "-t-" estas la OBJEKTAJ PARTICIPOJ; ili rilatas al la objekto de la participigita verbo. Oni nomas ilin ankaŭ PASIVAJ PARTICIPOJ.

| | SUBJEKTA | OBJEKTA |
|---|---|---|
| ANTAŬE | -int- | -it- |
| NUN | -ant- | -at- |
| POSTE | -ont- | -ot- |

Jen kelkaj ekzemploj:

La polico serĉas malaperintan virinon [virinon, kiu malaperis].
La virino estas enŝlosita en forlasita domo [domo, kiun oni forlasis].
Linda rigardas la kriegantajn soldatojn [soldatojn, kiuj kriegas].

Ŝi iomete timas pro la ĵetataj teleroj [teleroj, kiujn oni ĵetas].
Ĉu vi streĉe atendas la venontan ĉapitron [ĉapitron, kiu venos]?
Kion trovas la kaptotaj krimuloj [krimuloj, kiujn oni kaptos]?

Se la ĉefa parolo estas nuna (supre estas "serĉas", "estas", "rigardas",...), oni povas "traduki" la participojn jene:

X-inta → kiu X-is
X-ita → kiun oni X-is
X-anta → kiu X-as
X-ata → kiun oni X-as
X-onta → kiu X-os
X-ota → kiun oni X-os

Tamen, se la ĉefa parolo ne estas nuna, oni normale ne povas tiel simple "traduki". Ekzemple:

"Hieraŭ matene Bob pensis pri la farota laboro."

Sed eble li faris la laboron hieraŭ vespere. Se hodiaŭ oni dirus, ke hieraŭ matene Bob pensis pri la laboro, kiun oni faros, tio signifus, ke eĉ hodiaŭ la laboro ankoraŭ ne estas farita. Pli ĝusta "traduko" estas do: Hieraŭ matene Bob pensis pri la laboro, kiu estis objekto de posta faro.

"Morgaŭ vespere Bob rigardos la faritan laboron."

Sed eble li faros la laboron morgaŭ vespere. Se hodiaŭ oni dirus, ke morgaŭ vespere Bob rigardos la laboron, kiun oni faris, tio signifus, ke jam hodiaŭ la laboro estas farita. Pli ĝusta "traduko" estas do: Morgaŭ vespere Bob rigardos la laboron, kiu estos objekto de antaŭa faro.

Ĉu tiu klarigo estas komprenebla? Se ne, tio ne tro gravas, ĉar la realo estas multe pli simpla ol mia klarigo. Kompreneble oni normale ne tradukas participojn; oni komprenas ilin sentraduke. "Manĝonta" signifas kvazaŭ "malsata"; "manĝanta" signifas kvazaŭ "ĉe-tabla"; "manĝinta" signifas kvazaŭ "sata".

Provu la sekvantan ekzercon, en kiu oni devas reskribi uzante participon!

## *EKZERCOJ (23)*

*Ekzemplo:*

Mi serĉas monujon, kiun mi perdis.

→Mi serĉas perditan monujon.

Reskribu uzante participon!
La strangulo parolas al si mem, ne atentante la studentojn, kiuj lin rigardas.
La studento redonas la librojn, kiujn li jam legis.
Kato, kiu manĝis, normale volas dormi.
La policanoj ne rekonos la krimulon, kiun ili serĉas.
Li zorge purigis la aŭton, kiun li volis vendi.
En la universitato Marta estas virino, kiun ĉiu konas.
Ŝi provis legi la numeron de la aŭto, dum ĝi veturas.
Tiam ŝi ankoraŭ havis la monujon, kiun ŝi poste perdis.
Li pensis pri la suferoj, kiujn li jam travivis.
Mi plendos pri la seĝoj, kiuj malaperis.
Mi devis atendi la buson, kiu venis poste.
Ŝi longe adiaŭis la amikon, kiu devis foriri.

# ĈAPITRO 24 (DUDEK KVAR)

"Nur papero!" kriis Ronga.

"Ankaŭ estas libro!" diris Marta, sed jam Ronga laŭtlegis:

"Tie ĉi kuŝas la Trezoro de la Lumo. Pro la daŭra persekutado, la Sankta kaj Sekreta Frataro de la Lumo-Serĉantoj baldaŭ ĉesos ekzisti. Sed ĝia Spirito plu vivos. Iun tagon, homoj retrovos la Sanktajn Principojn kaj rekomencos ilin apliki. Por ili estas ĉi tie kaŝita la Trezoro de la Lumo.

"Ĝi estas skribita en la Speciala Lingvo de la Frataro, sed certe homoj troviĝos, kiuj ĝin povos kompreni. La Trezoro konsistas el la arto praktike apliki kaj defendi la Veron, la Justecon, la Dignecon, la Respekton al ĉiu homo, la Interkomprenon, la Honestecon, la Amon, la Kompatemon kaj la Konon de si mem kaj de sia ĝusta loko.

"Por la Frataro, la Spiritaj Valoroj estas la plej altaj. Tial ĝia Trezoro estas pure Spirita.

"Al vi, homo, kiu trovis ĝin, trans multaj aŭ malmultaj tagoj, semajnoj, monatoj, jaroj, jardekoj aŭ jarcentoj, Saluton kaj Fratecon!"

* * *

Ili sidis en komfortaj brakseĝoj en la hejmo de Gerda.

"Kio okazis poste?" ĉi-lasta demandis.

"Ni malkaŝis nin, kaj mi ilin arestis," diris la policano. "La loka polico estis antaŭe informita, kaj enŝlosis ilin."

"Ĉu vi scias, kiel komenciĝis la afero?" scivolis Tom.

"Proksimume. Kiam Marta estis flegistino en la hospitalo, ŝi ĉeestis kirurgian operacion de historiisto, Prof. (=Profesoro) Kosadi. Kiam ĉi-lasta estis duone dormanta, duone vekiĝanta, li parolis nekonscie pri la trezoro de la Lumoserĉantoj. Li diris, ke temas pri malnova societo, elita, tre riĉa, pri kies trezoro li eksciis hazarde legante en la Vatikana Biblioteko."

"Jes," daŭrigis Gerda. "Tiun parton de la afero mi konas. Li faris historian esploron en la Biblioteko Vatikana. Inter la paĝoj de malnova libro, li trovis dokumenton en la sekreta lingvo de la Lumoserĉantoj. Li antaŭe kelktempe interesiĝis pri tiu sekreta societo internacia, kaj iom komprenis ĝian sekretan lingvon. Li komprenis, ke tiu papero indikas, kie troviĝas la trezoro de la Lumoserĉantoj, sed mem ne povis traduki ĉiujn detalajn indikojn. Li ricevis la permeson fotokopii la dokumenton. Foje, kiam ni renkontiĝis, li parolis pri tio al mi. Li diris, ke eble homoj provos trovi tiun trezoron, ĉar pli kaj pli multaj personoj interesiĝas pri la malnovaj sekretaj societoj. Li sciis, ke mi estas la sola persono en la mondo, kiu vere ĝisfunde studis tiujn malnovajn sekretajn

lingvojn, kaj li petis min solene promesi, ke mi neniam kunlaboros kun homoj serĉantaj la trezoron pro materia intereso."

"Kion li volis, ke oni faru pri ĝi?" Linda demandis.

"Ke ĝi transiru al iu muzeo aŭ ŝtata institucio."

Tom intervenis:

"Kiel Marta ricevis la fotokopion?"

"Tion ŝi mem klarigis al mi," respondis la policano: "ŝi konstatis, ke la substanco uzita antaŭ la operacio por dormigi la profesoron estas unu el tiuj, kiujn oni kelkfoje uzas por t.n. (= tiel nomata) narkoanalizo. Post la operacio, kiam la profesoro kuŝis en sia ĉambro -- li havis privatan ĉambron kaj do estis sola -- ŝi injektis al li tiun substancon, kaj pridemandis lin. Sub la influo de la koncerna substanco, oni dormas, sed dormante aŭdas kaj respondas demandojn, ĝenerale dirante la veron. Li do dorme respondis al ŝi. Per tiu metodo ŝi eksciis pri tio, ke nur unu persono en la mondo, nome Gerda, komprenas tiun sekretan lingvon, kaj pri multaj aliaj aferoj."

## *DEMANDOJ (24)*

Kiel aspektis la trezoro?
Kion legis Ronga?
Kiam Marta eksciis pri la trezoro de la lumoserĉantoj?
Kie profesoro Kosadi faris historian esploron?
Kion profesoro Kosadi eksciis pri la trezoro? Kion li ne povis kompreni?
Kiel Marta eksciis pri la trezoro?

**NOTOJ**

En la antaŭa ĉapitro vi lernis pri ĉiuj ses participoj en Esperanto, sed ni uzis ilin nur kiel adjektivojn. Adjektivon oni povas uzi aŭ apud substantivo ("Ŝi vidas blondan viron"), aŭ kun iuj verboj, ekzemple "esti" ("La viro estas blonda"). Ankaŭ participajn adjektivojn oni povas uzi en tiuj du manieroj:

Mi vizitas la enŝlositan virinon.

La virino estas enŝlosita.

La participaj adjektivoj havas la saman signifon en ambaŭ situacioj.

Oni povas montri la subjekton de objekta (pasiva) participo per la prepozicio "de":

Mi vizitas la virinon enŝlositan de la blondulo.

La virino estas enŝlosita de la blondulo.

Tiuj frazoj signifas preskaŭ same kiel:

Mi vizitis la virinon, kiun la blondulo enŝlosis.

La blondulo enŝlosis la virinon.

Tiuj lastaj frazoj estas tamen pli simplaj kaj pro tio pli bonaj.

Eblas uzi ankaŭ subjektan (aktivan) participon post la verbo "esti":

La blondulo estas enŝlosinta la virinon.

Tiaj "kunmetitaj verbotempoj" estas tamen tre maloftaj. Preskaŭ ĉiam sufiĉas simple:

La blondulo enŝlosis la virinon.

Participoj uziĝas ne nur adjektive, sed ankaŭ adverbe kaj substantive. Ni konsideru unue ilian substantivan uzadon. Participaj substantivoj havas kompreneble la finaĵon "-o": malaperinto, krieganto, kaptoto. Oni devas memori, ke participa substantivo ĉiam signifas personon, aŭ ulon. "Malaperinto" estas do "malaperinta ulo", "krieganto" estas "krieganta ulo",

kaj "kaptoto" estas "kaptota ulo". Se oni volas paroli pri aĵo, oni povas uzi kroman finaĵon "-aĵ-". "Donitaĵo" estas ekzemple aĵo donita, io donita.

Participaj adverboj havas la finaĵon "-e": enirante, foriront e, vidinte. Pri participaj adverboj oni devas memori, ke ili ĉiam rilatas al la subjekto de la frazo. Ekzemple, la frazo:

Bob vidis Lindan enirante la restoracion.

Devas signifi:

Bob vidis Lindan, dum li (Bob) eniris la restoracion.

Jen aliaj ekzemploj:

Foriront e Bob turnis sin al la pordo.

(Bob turnis sin al la pordo por foriri.)

Vidinte Lindan Bob iris al ŝia tablo.

(Post kiam li vidis Lindan, Bob iris al ŝia tablo.)

Kompreneble oni povas uzi ankaŭ objektajn (pasivajn) participajn adverbojn:

Bob forlasis la restoracion ne vidite de Linda.

Observate de la studentoj li ne kuraĝis foriri.

Kaptote de la malamiko li decidis sin mortigi.

En skriba Esperanto oni ofte uzas tiajn frazojn kun participaj adverboj, sed en parolata Esperanto ili ne estas tiom uzataj. Oni preferas paroli per simplaj mallongaj frazoj.

## *EKZERCOJ (24)*

*Ekzemplo:*

ĈAR la studentoj LIN OBSERVIS, li ne kuraĝis foriri.

→ Observate de la studentoj li ne kuraĝis foriri.

Forigu la vortojn skribitajn GRANDE!

La HOMOJ, KIUJ FORIROS, ne plu zorgos pri sia laboro.

La INFANOJ, KIUJ LERNAS, ekstaras, kiam la instruisto envenas.

POST KIAM LI longe PRIPENSIS la aferon, li decidis ekagi.

Oni enŝlosis la HOMON, KIUN ONI KAPTIS, en la policejo.

La HOMO, KIU MALAPERIS, estas instruisto pri malnovaj sekretaj lingvoj.

DUM LI ATENDIS la buson, Tom ekhavis ideon.

La HOMOJ, KIUJN LA AFERO INTERESAS, povas trovi pli da informoj en iu ajn biblioteko.

La blondulo forveturis, DUM Tom kaj Linda OBSERVIS LIN.

La HOMOJ, KIUJN ONI LIBERIGOS, ankoraŭ atendis la malfermon de la pordego.
ĈAR la polico LIN KAPTOS, la spiono manĝis la dokumenton.
POST KIAM ĉiu FORGESIS ĜIN, la libro atendis multajn jarcentojn en la biblioteko.
TUJ ANTAŬ OL LI MALFERMIS la pordon, li subite konsciis pri stranga bruo venanta de ĝia alia flanko.

# ĈAPITRO 25 (DUDEK KVIN)

"Sed vi ne respondis pri la fotokopio!"

"Ho, pardonu. La profesoro havis ĝin en sia paperujo. Li fartis tre malbone post la operacio. Marta simple prenis la dokumenton el lia paperujo, dum li dormis; ŝi ja sciis, ke li ne vivos longe. Li fartis malbone. Lia sanstato ne lasis multe da espero. Fakte, li baldaŭ mortis post tio. Neniu do zorgis pri la malaperinta papero."

"Kiel Ronga enmiksiĝis en la aranĝon?"

"Li estis la amanto de Marta, kaj ŝi rakontis al li. Li vivas tiamaniere, ke li daŭre bezonas multe da mono. Li organizis la aferon. Estas li kaj kolego Fergus, kiuj forportis Gerdan, post kiam ili batis Bob senkonscia. La oficejo de Fergus estas tute proksima. Tien ili portis ŝin, kaj tie ili atendis, ĝis la vojo estis libera kaj ili povis veturigi ŝin al la forlasita domo."

Gerda parolis:

"La frato de Marta plurfoje vizitis min, antaŭ kelkaj monatoj. Li provis igi min traduki por li la dokumenton. Sed kiam mi demandis, de kie li ricevis ĝin, li hezitis, iom paliĝis, ne respondis tuj, kaj mi komprenis, ke li ne agis honeste. Mi memoris la vortojn de Prof. Kosadi, kaj malakceptis kunlabori. Sed li revenis unufoje, dufoje, trifoje. Mi ĉiufoje rifuzis. Kiam mi poste ricevis inviton instrui pri malnovaj sekretaj lingvoj en la kadro de kurso de Prof. Ronga, mi tute ne imagis, ke estas rilato inter Ronga kaj la junulo, kiu tiel ofte venis al mia hejmo insisti, por ke mi traduku la paperon pri l'trezoro."

"Jes," diris Tom. "Pro via plurfoja rifuzo ili elpensis tiun planon. Kapti vin kaj perforte devigi vin traduki la tekston."

"Tiom da riskoj kaj zorgoj por nenio!" komentis Gerda. "Kia malsaĝeco! Kia stulteco!"

"Jes. Amatoroj," diris la policano malestime. "Ili agis amatore ekde la komenco. Pro tio ni tiel facile ilin kaptis. Sed pri tiu amatoreco vi danku Dion, Gerda. Pro tiu amatoreco ni povis liberigi vin, kaj vi plu vivas. Neamatoroj en simila situacio ne hezitus: vin uzinte, ili vin mortigus."

"Ĉu vere?"

"Jes. Vi sciis tro multe. Estus tro danĝere lasi vin vivi. Sincere, vi povas danki Dion, ke nur amatoroj planis kaj realigis tiun aferon."

Gerda silentis, pensema.

"Terure!" ŝi fine diris. "Ĉiaokaze, mi plej sincere dankas vin, ĉiun el vi. Vi agis mirinde. Vi savis min kaj mian filinon. Sed, Bob, kion vi opinias pri la tuta afero? Vi ankoraŭ diris nenion."

Bob rigardis ŝin, kiun iom stranga esprimo.

"Mi plezure trinkus glason da brando," li diris. Kaj li restis malĝojeta, dum ĉiuj aliaj ekridis.

# NOVA MISTERO!

KARA KAJ ESTIMATA LEGINTO,

Vi legis ĉi tiun aventuron ĝis la fino. Sendube vi estas kontenta, ke ĉio finiĝis bone. Sed ĉu vi rimarkis, ke en la rakonto grava kontraŭdiro troviĝas? Alivorte, en unu loko la aŭtoro diras ion, kaj en alia li diras la kontraŭon. Vi ne rimarkis, ĉu vere? Bedaŭrinde! Nun vi devos relegi la tutan tekston por trovi, pri kio temas. Legu atente, kaj se post unu legado vi ne trovis, relegu duan fojon, trian fojon, ktp. Certe vi fine trovos. Kaj se ne, nu, la vortoj kaj esprimmanieroj de esperanto pli bone metiĝos en vian kapeton...

## *DEMANDOJ, SED NE EKZERCOJ*

Ĉar tiu ĉi estas la lasta ĉapitro de la GERDA-kurso, ne estas demandoj pri la teksto, kaj ne estas ekzercoj. En ilia loko estas demandoj pri la tuta kurso, pri via opinio pri la kurso. Mi esperas, ke vi zorge respondos ilin, ĉar viaj respondoj helpos nin plibonigi la kurson.

Respondu per multegaj vortoj!

Kiom da Esperanto vi jam sciis, kiam vi komencis la GERDA-kurson? Kiel vi lernis Esperanton antaŭe?

Ĉu la GERDA-kurso estis por vi utila? Ĉu vi sukcesis multe lerni per ĝi? Ĉu vi ĝuis ĝin?

Ĉu vi pensas, ke la teksto uzita (la rakonto "Gerda malaperis!") estis bone elektita? Ĉu ĝia lingvaĵo estas tro simpla? Ĉu la rakonto estas tro stulta, infaneca aŭ malinteresa?

Ĉu la demandoj pri la teksto estis utilaj? Ĉu eble estus pli bone havi nur ekzercojn post ĉiu ĉapitro, sen demandoj? Ĉu la demandoj estu malpli simplaj, por ke oni povu respondi ilin per pli da vortoj?

Ĉu la ekzercoj estis utilaj? Ĉu la vortaro-ekzercoj, en kiuj oni devas parigi vortojn kaj difinojn, estis utilaj? Kiuj estis la plej utilaj ekzercoj, kaj kiuj estis la malplej utilaj? Ĉu vi povas proponi aliajn specojn de ekzercoj?

Ĉu la "vortlisto" estis sufiĉe bona? Ĉu ĝi enhavu pli da gramatikaj klarigoj, aŭ pli da ekzemploj? Ĉu ĝi estu havebla en aliaj lingvoj? Ĉu eble vi eĉ povus helpi traduki ĝin al alia lingvo?

Ĉu vi uzis aŭ havas iujn aliajn lernilojn, ekzemple vortaron aŭ lernolibron pri Esperanto? Kiujn?

Ĉu vi volas plulerni Esperanton? Kiel? Ĉu kurso simila al la GERDA-kurso, sed kun bonaj literaturaj tekstoj anstataŭ la GERDA-rakonto, estus utila por vi? Ĉu vi preferus simple trastudi iun libron en Esperanto? Ĉu vi volus trastudi libron diskutante ĝin kun iu? Ĉu vi volas lerni pli pri la historio kaj celoj de la Esperanto-Movado?